

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

FEL

Flugi kun kakatuoj

Mi dediças ĉi tiun romanon

al mia edzino Katja

kaj mia filo David

Flugi kun kakatuoj

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

n-ro 35 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro estas nur parto de la originala verko kaj rajtas esti kopiata laŭplaĉe.

La ekspedicio de s-ro Forrest

La eta knabo surgenuiĝis, kvazaŭ tiel li pliproksimiĝus kaj pli bone vidus la spektaklon. Tute alte sur la rokmuro li povis kaŭre gvati ĝis la horizonto, sed la plilongiĝantaj ombroj diris al li, ke restas nur iom da taglumo. Li nur duone aŭskultis la koleran voĉon de Elmaru, kiu alterne fingromontris al la formiksimilaj homfiguroj kaj bestoj malsupre kaj turnis sin al la homoj ĉirkaŭ si. Jangabara, la rondvizaĝa knabo, kaŭris inter grupo de samaĝuloj, kaj kaptis nur kelkajn frazojn el la buŝo de tiu potenculo Elmaru, pri kiu oni diris, ke li kapablas devigi eĉ malamikojn fari, kion li volas. Sed kiam Elmaru parolis tiel kolere, li ŝajnis malpli potenca, kriante kontraŭ fortoj, kiujn li ne regis.

Jangabara sciis, ke kiam li mem volis plori aŭ sakri pro nevenkebla obstaklo aŭ io timinda, li koleriĝis. Do ĉu eĉ Elmaru timis la etajn homfigurojn tie malsupre?

Provizore Jangabara vidis kaj aŭdis nenion alian krom la raŭke kriĉantajn kakatuojn, kiuj preterflugis en sia blanka gloro. Kiel ĉiuj Banubi-infanoj, li sciis, ke kakatuoj estas sanktaj birdoj, eĉ se ilia voĉo estas surdiga kaj nedolĉa.

La bela blanka svarmo flugis pluen, kaj la knabo ree kaptis frazojn el la buŝo de la granda viro Elmaru: "... ili jam forprenis la teron de la Mirari kaj la Bunambi kaj la Gujini kaj de la insulanoj ... tiuj popoloj nun estas sklavoj sen tero ... devas plonĝi en la maron kaj elpreni konkajn ... kaj la virinoj devas malfermi siajn kruojn al la fekuloj ... kaj en aliaj lokoj la fekuloj forprenis la teron de la Ngurabi kaj Njangari kaj grasigas tie siajn stultajn longharajn blankajn bestojn."

Jangabara rigardis malsupren al la etaj homoj kaj iliaj bestoj, kiuj moviĝis malrapide kaj paralele al la klifoj, sur kiuj li kaj Elmaru kaj dekoj da aliaj klananoj staris. Subite Elmaru enmanigis ŝtonon kaj ĵetegis ĝin en la direkton de la foraj homoj. Kompreneble la ŝtono neniel atingus la celon, sed Jangabara rigardis fascinate ĝian trajektorion. Ĝi falis, falis en kurba flugo, falis senfine, sed malaperis kaj eble eĉ ne atingis la teron tie sube, tiel altaj estis la klifoj. Kaj la homoj kaj bestoj estis almenaŭ tiom for de la

klifbazo, kiom li, Jangabara, povus plenforte kuri senpaŭze – ili tute ne suspektus, ke iu ĵetas ŝtonon preskaŭ el la nuboj.

Elmaru turnis sin refoje al siaj kunuloj: “Kaj vidu, ili volas veni sur nian teritorion. Jes, ili ne povas pasi tra nia montaro, sed ili provos. Kaj se iam ili atingos nian teron, ili uzos niajn fontojn kaj riveretojn, kaj iliaj malpuraj rajdhundoj kaj kornaj blekbestoj kaj longharaj blankaj bestoj manĝos la herbojn kaj forpelos niajn bestojn. Kaj – mi jam vidis tion aliloke – ili faros aĉodoran ŝlimon el niaj sanktaj akvejoj ...”

Sed Jangabara ne povis vidi kornajn aŭ longharajn bestojn en la procesio tie malsupre. El tia granda distanco oni ne bone vidis, eĉ Elmaru kun sia akra vidpovo devis nur diveni, kiel aspektas la homoj en varmaj korpokovraĵoj. Kaj kiom ili estis? Jangabara uzis siajn fingrojn: jes, ili nombris proksimume tiom, kiom da fingroj li havis. Kaj eblis vidi, ke ili ja rajdas sur bestoj, kiuj tamen ne vere aspektas similaj al hundoj. Evidente Elmaru ne ŝatis tiujn rajdobestojn, sed Jangabara provis imagi, kiel estus, se li mem sidus sur tia portobesto. Eble interese.

Se Elmaru nomis la homojn tie sube fetoraj fekuloj, evidente ili estis malbonaj. Sed la knabo sin demandis, de kie venas tiuj fekuloj, kaj kien ili iras. Ĉu ankaŭ ili iam kuŝis en kangurufela sako sur la dorso de la patrino? Ĉu ankaŭ ili ofte dormas en kaverno, se pluvas, aŭ sub la steloj? Ĉu iliaj viroj ĉasas kanguruojn kaj emuojn kaj aliajn grandajn bestojn, dum la virinoj fosas radikojn el la tero kaj rikoltas berojn kaj fruktojn de la arboj? Ĉu ankaŭ iliaj viroj ofte kverelas pro virinoj? Ĉu ankaŭ iliaj knaboj ekzercas ĵetadon de lancoj? Ĉu ili multe rakontas kaj kantas kaj dancas nokte ĉirkaŭ komuna vespera fajro? Ĉu ankaŭ ili havas ie grandajn montojn kun nenombreblaj kavernoj? Ĉu ili volvas siajn mortintojn en arboŝelon kaj metas ilin en specialan kavernon? Ĉu ankaŭ ili ŝatas naĝi kaj fiŝkapti en purakvaj riveretoj? Ĉu ili regule forbruligas altajn sekajn herbojn, ke kresku freŝaj, kiuj manĝigu kanguruojn?

Subite la knabeto vidis ion novan. Kial li ne vidis antaŭe, ke ne ĉiuj rajdas? Kelkaj marŝis apud rajdobestoj, kiuj portis anstataŭ homon grandan ŝarĝon. Jangabara forte fokusis siajn okulojn. Kvankam estis malfacile juĝi el tiu distanco, li estis preskaŭ certa, ke la marŝantoj estas nigrahaŭtaj, same kiel li, kvankam ankaŭ ili estas grandparte kovritaj de vestoj. Kiom ili estis? Li levis siajn fingrojn kaj forprenis unu. Tiom. Se la

homoj vere estis nigrahaŭtuloj, kian vivon ili havas?

Malrapide la procesio formoviĝis, kaj videble la homoj serĉis vojon ĉirkaŭ la alta rokmontaro. Tio kondukos ilin for de la teritorio de la Banubi, la popolo de Jangabara. La tono de Elmaru mildiĝis, sed lia kolero restis. Li gestis ankoraŭ unu fojon kaj elkraĉis la vortojn, “Mi konas tiujn fetorajn fekulojn, tiujn palvizaĝulojn. Kaj mi timas, ke ili revenos kaj provos preni ankaŭ nian teron. Eble en la venonta seka sezono. Ili ne forgesos, ke ni havas belan teron kun multe da akvo, kaj ili volos ĝin havi por si. Ne forgesu miajn vortojn!”

Sed baldaŭ noktiĝos, do ĉiuj reiris al la fajro manĝi. Jangabara kaj la aliaj knaboj ankoraŭ iom ludis, antaŭ ol nokto kovros la teron kaj fantomoj vagos tra la arboj.

Lia panjo jam vokis lin, sed Jangabara ion memoris, “Momenton, Panjo, mi volas paroli kun Elmaru.”

Aplombe la knabo aliris tiun altstaturan potenculon kaj diris, “Onklo Elmaru, kial la fetoraj fekuloj volas havi nian teron? Kiel ili povus ĝin preni? La Antaŭuloj malpermesus tion, ĉu ne?”

Elmaru la timindulo alridetis la ĉarman knabeton. “Filo Jangabara, iam mi klarigos al vi. Nun mi diru nur, ke tiuj homoj kun blanka kaj ruĝa haŭto kaj strangaj kovraĵoj sur la korpo ne komprenas la Antaŭulojn. Ili kredas, ke ili povas preni teron de aliaj, aĉeti kaj vendi ĝin.”

“Onklo, kio estas aĉeti kaj vendi?”

Elmaru ridis kaj prenis la knabon sur sian sinon. “Tion vi komprenos poste, etulo. Nun iru al via Panjo kaj dormu kaj kresku forta. Kiam vi estos granda viro, vi batalos heroe por ni Banubi. Ni bezonos vin. Kara knabo, iru al via Panjo.”

“Sed mi ne finis, Onklo Elmaru. Vi diris, ke tiuj homoj hodiaŭ estas fekuloj. Sed mi kredas, ke kelkaj havas la saman haŭtkoloron kiel ni. Tiuj, kiuj marŝis kaj ne rajdis. Ĉu ankaŭ ili estas fekuloj?”

“Ili eble eĉ pli ol la palvizaĝuloj,” Elmaru grimacis. “Do filo Jangabara, vere estas tempo por dormi. Iru nun. Via Panjo rakontos al vi, antaŭ ol vi

ekdormos.”

Jangabara iris al sia patrino Majarina, kaj la du ekkuŝis proksime al mortanta fajro. La palpebroj de la knabo daŭre plipeziĝis, kaj eble li aŭdis ne pli ol, “ ... la bona Dio de la Banubi, la Granda Patro Taltjina, vivis kun siaj edzino kaj diaj filoj super la steloj en la Ĉielo en eterna juno kaj feliĉo. La Ĉielo staris kvarpiede sur la Tero, kaj la steloj estis la noktaj fajroj de la dioj ...”

Billy Dixon staris inter la miloj sur la ĉefa strato, la Teraso de Sankta Georgo, kaj decidis eniri Kazernan Straton, dum tio ankoraŭ eblas. Li estis nur unu fojon, la tagon de sia alveno, tramarŝinta la urbon, sed jam oni rakontis multon al li survoje el Madraso, kaj li havis iom da tempo por konatiĝi kun la bela, larĝa rivero Cigno kaj la centro. Jes, la urbo estis malgranda, apenaŭ pli granda ol urbeto en Anglio – iu menciis, ke eble estas 20 000 loĝantoj – sed ĝi devis funkcii kiel la ĉefurbo de kolonio ŝajne same granda kiel la britaj provincoj de Hindio. Okcidenta Aŭstralio oni nomis ĝin. Kolonio onidire en malbona ekonomia stato, bezonanta homojn.

Billy volis esti bezonata. Li konfesis al si, ke jen la ĉefa motivo por forlasi Hindion kaj iri al kolonio, kiu aktive serĉas koloniistojn. La krudeco de la britoj, kiujn li renkontis en Hindio, estis dolora surprizo. La krudeco de viroj inter si, kaj neeltenebla snobeco de viroj kaj virinoj en societo. Antaŭe li ial imagis, ke en la vastega kolonio klasdividoj malpliigus, sed male ili iĝis eĉ pli rigoraj. La lokajn hindojn li apenaŭ renkontis. Kaj ĉiukaze, renkonti hindojn estis io, kion “oni ne faras”. Li esperis, ke oni aprecos lian edukitecon kaj kapablon flue legi la latinajn klasikaĵojn. “Hindio, la juvelo en la krono de Victoria,” oni diris. Kaj oni fieris, ke kelkaj miloj da britoj regas centmilionojn per la klasika imperiisma strategio *dividu kaj venku*.

Ĉu li ne estis naiva, kiam li imagis, ke tie li faros karieron kaj estos *aprecata*? Nu jes, naiva kiel ĉiam!

Sed sufiĉu la morna meditado! Li estis nun en Perto, ĉefurbo de alia kolonio, kie oni bezonis homojn. Eble li estos iam prospera bienisto kaj

reiros al Kent kaj klare montros al Paĉjo kaj ĉiuj aliaj, ke Billy ne estas la idioto de la familio, tiu, kiu neniam "iom valoros". Nova mondo bonvenigas lin, tion li memoru.

Kaj tuj okazos io. Io eble bonaŭgura. Ĉiu civitano de Perto parolis pri la fabele sukcesa ekspedicio de grupo, kiu malkovris tiom da bonega paŝtoterio en la nordo de la kolonio. Fakte hodiaŭ estos la triumfa akcepto de la ekspedicianoj, kaj Billy Dixon nepre volis atesti tion. Li jam informiĝis, ke post oficiala akcepto ĉe la rezidejo de la guberniestro la procesio iros laŭ la Teraso de Sankta Georgo ĝis dekstreniĝo en Kazernan Straton, kaj tiam ĝis la urbodomo.

Billy jam marŝis tiun vojon kaj ricevis diversajn impresojn pri la urbo mem. Malgranda jes, sed kompanse ĝi tre elstarigis societajn diferencojn. Unuflanke estis la ruĝ-kaj-flav-brikaj domoj de la riĉuloj, kaj la ĉielpenetraj turoj kaj spajroj de la katolika (de Sankta Maria) kaj anglikana (de Sankta Georgo) katedraloj kaj la palacoj de la respektivaj episkopoj, kaj ankaŭ la metodistoj, kongregacianoj kaj framasonoj havis pompajn domojn, eĉ la Laborista Instituto estis solida konstruaĵo. La bonstataj burĝoj portis vestojn, pri kiuj oni ne hontus en la Wellington-Klubo en Londono, kaj la armeoficiroj similis ekzotikajn birdojn kun bunta plumaro inter la malbrilaj soldatoj. Sed aliflanke Billy vidis jam la unuan tagon mizerajn kabanajn iom ekster la zono de la bonŝanculoj, kaj kompreneble oni vidis ankaŭ aborigenojn, ŝajne tute senhavajn, en dormejoj el arboŝelo. La unuan vesperon Billy ridis pri sceno, kiu povintus okazi ankaŭ en Hindio. Du aborigeninoj staris apud barilo de mezprospera domo, eble planante ion ŝteli. Subite aperis la domposedantino, svingante akvositelon kaj rapide alirante la nigrulinojn, kiuj tuj forkuris. Ne estis certe, ke estas akvo en la sitelo, sed jam la minaco priĵeti ilin efikis.

Pli kaj pli da homoj venis sur la stratojn, kaj Billy devis lukti por akiri lokon inter la miloj da festemuloj. Estis iom nekutima aranĝo: la ekspedicianoj estos unue akceptitaj kaj gratulitaj en la rezidejo, kiu tamen estis tro malgranda por gastigi la oficialan ceremonion. Do post tiu privata akcepto la guberniestro mem laŭiros la stratojn en sia tre pompa ĉevalĉaro – eĉ la kovraĵoj de la kvar ĉevaloj estis evidente multekostaj – kaj la ekspedicianoj sekvos laŭrange sur ĉevaloj, survoje al la urbodomo, ĉar

tie lia guberniestra moŝto deziris alparoli kiom eble plej da civitanoj.

Kaj tiel okazis. Evidente la akcepto ĉe la rezidejo jam okazis, kaj la procesio direkte al la urbodomo ekis. Ial la cilindraj ĉapeloj de la herooj kaj iliaj frakoj ne konvenis al ilia ĉevalrajda rolo, sed desur la selo ili povis grandgeste agnoski sian gloran rolon kaj danki pro la senĉesaj huraoj kaj aplaŭdoj de la dense amasiĝantaj homoj.

Ĉar Billy bone sciis pri la itinero, li elektis starlokon proksime al la urbodomo. Klare, eĉ tiu iom granda salono ne povos ricevi pli ol mil homojn, kaj Billy volis esti certa, ke li eniros kaj aŭdos la paroladojn. La homoj surstrate ekstere devos dependi de duamana raporto.

La dika guberniestro elĉariĝis, helpate de siaj lakeoj, kiuj kubutume kreis liberan koridoron, ke lia moŝto eniru la salonon de la urbodomo. Billy iom ridetis pri la multegaj ornamaĵoj sur la brusto de la guberniestra moŝto: neniun aŭtoritatulo en Hindio havus tiom. Bonŝance la guberniestro estis korpulenta sinjoro, kaj do estis multe da spaco sur la brusto.

Tiam aperis la ekspedicianoj: svelte fortikaspektaj viroj, ankoraŭ maldikaj pro la multaj monatoj da penoplena vivo en sovaĝaj lokoj. Iliaj barboj kaj hararoj estis pli grizaj ol nigraj, pruvo pri la malfacila tasko, kiu tamen atingos nun sian gloran momenton. Billy konis neniun el la nomoj de la herooj: unuopaj homoj kriis huraojn al ili laŭnome, sed nenio distingeblis en la granda bruo. Tamen jes, la nomo "Forrest" estis ripetfoje aŭdebla. Jes, kompreneble, li estis la estro de la grupo.

Unu post alia la ses herooj deĉevaliĝis kaj oni forkondukis la ĉevalojn. Kaj laŭrange ili ses eniris la salonon kaj eksidis sur la podio, la loko de honoro. Sekvis granda impeto de homaj korpoj dezirantaj sin puŝi en la salonon. Billy staris tuj malantaŭ dika, forta viro, kiu bonŝance por Billy fosis vojon inter la malpli substancajn korpojn. Preskaŭ gluiĝante al la grandulo, Billy sukcesis eniri. Nelonge poste estis bruo de pordega fermo, ordonoj de oficialuloj, kaj protestoj de forbaritoj. Billy danke trovis sidlokon.

Kelkaj minutoj pasis, antaŭ ol ĉiuj sidis kaj la ceremonio povis komenciĝi. La imponaj ventro kaj brusto de la multornama guberniestro transprenis la reĝisoradon. Li ekstaris kaj solene vokis al si laŭvice la heroojn,

kompreneble ankaŭ laŭrange, kaj alpinglis medalon sur ĉies bruston. Estis unu neplanita interrompeto, kiam la ĉefa heroo, s-ro Forrest, levis la voĉon por laŭdi la kvar aborigenojn, kiuj gvidis la grupon en multaj danĝerplenaj lokoj. “Fakte,” diris s-ro Forrest, “sen la inteligenta kontribuo de Neĝobulo kaj Jacky, kaj ankaŭ de Henry kaj Cezaro, ni eble ne starus vivantaj antaŭ vi.”

Estis mallonga aplaŭdo. Nu jes, oni laŭdu se necese la nigrulojn, sed estus neelteneble, se oni publike alpinglus al ili medalon. Sendube oni donis al ili tabakon antaŭ la ceremonio.

“Gesinjoroj,” oratoris lia guberniestra moŝto Herbert, “estas mia plezuro honori hodiaŭ la kuraĝajn sinjorojn inter ni, heroojn, kiuj ripetfoje devis eviti morton dum longa kaj multrilate danĝerrega ekspedicio. Sed ili ne nur brile plenumis la celon de la tuta entrepreno, nome esplori kaj konatigi al ni grandajn regionojn de nia vastega kolonio. Ne, gesinjoroj, ilia grandioza ekspedicio, pri tio mi ne dubas, estos memorata de estontaj generacioj kiel turnopunkto en la historio de Okcidenta Aŭstralio.”

Bruetoj aŭdiĝis inter la dense kunpremitaj aŭskultantoj. Oni sentis, ke ondo da ekscitiĝo travibras la salonon.

“Mi ne troigas, gesinjoroj. Ni ĉiuj de tempo al tempo sentis, mi kredas, maltrankvilon pri la evoluo – aŭ manko de evoluo – de nia kolonio. Jes ja, nia estas kolonio de la plej granda Imperio en la historio de la mondo, tiu Imperio, sur kiu la suno neniam subiras. Kaj niaj kuzoj en la orientaj partoj de nia kontinento spertadas daŭran progreson: unuavice Viktorio, kiu havas la honoron porti la nomon de nia amata imperiestrino, estas nun inter la plej prosperaj landoj de la tuta mondo, kaj Nova Sud-Kimrio fartas preskaŭ same bone. Nun Kvinlando spertas sian ekonomian soron, kaj eĉ la relative malriĉa kolonio Sud-Aŭstralio havas dignan vivnivelon.

“Jen kelkaj sobrigaj ciferoj, gesinjoroj. Viktorio, nia malgranda sed plej progresinta kolonio, havas nuntempe 874 000 loĝantojn. Nova Sud-Kimrio havas 770 000. Sud-Aŭstralio, kolonio grandparte dezerta, havas jam 285 000. Eĉ Tasmanio, kiu havas nur oneton de nia areo, fieras pri 118 000. Kaj kiom ni havas en nia giganta Okcidenta Aŭstralio? Divenu.”

La dikventra moŝto lasis iom da tempo, ke oni pripensu, sed neniu riskis proponi ciferon.

“Ni havas ... kaj la nombro eĉ *malkreskas* ... apenaŭ 30 000.”

“Jes, kial ni ĉiam lamas malantaŭ ili?” venis krio el la dekstra malantaŭa angulo de la salono.

S-ro Herbert paŭzetis kaj kapmovis en la direkton de la demandinto. “Nu, nia amiko tie malantaŭe levis tre legitiman demandon. Kaj mi volonte respondas, ĉar tiu ĉi ekspedicio,” li gestis al la herooj, “donas al ni realan perspektivon venki la situacion, ke ni postlamas.”

La guberniestro havis agrablan baritonan voĉon kaj fajnan sudanglan akĉenton. Gepatroj povis tute senrezerve diri al siaj infanoj, ke ili imitu la parolmanieron de la reprezentanto de ŝia imperiestra moŝtino. Vere, kun plezuro oni aŭskultis lin, kiu iam devis debati en la parlamento en Londono, la tutmonda centro de potenco: “Jes, kial nia manko de progreso? Mi ripetu faktojn, kiujn ĉiuj el vi konas, sed ne malutilos ilin reliefigi. Plej simple: la ekonomio de nia kolonio ne progresas.

“Nia loĝantaro ne kreskis dum la lastaj jardekoj, krom tiu eksperimento inter 1850 kaj 1865 importi malliberulojn el la hejmlando. Tiuj malliberuloj, sub la minaco de vipo, foje faris utilajn laborojn, ili plibonigis la ĉarvojojn en la urbo kaj inter Perto kaj nia haveno en Fremantle. Ili helpis konstrui kelkajn publikajn domojn. Sed tiaj laboroj ne vere enspezas al la kolonia kaso. Kaj – ni parolu honeste – per tiaj homoj oni ne konstruas grandan socion. Per tio oni ne progresas. Kaj kiel mi diris, nia loĝantaro aktuale eĉ malkreskas.

“Kial la aliaj kolonioj kontraste al ni progresas? Per tri vortoj: pro lano, bovoviando, kaj oro, antaŭ ĉio oro. Melburno ekzemple ege profitas de la malkovro de oro en diversaj partoj de Viktorio – ĝia loĝantaro duobliĝis en kelkaj jaroj, kaj ĝi starigis domojn kompareblajn kun la plej bonaj en la tuta Imperio. Trovo de oro venigas ne nur fosemulojn: eĉ kiam la oro ne plu troveblas, kutime multaj lertaj metiistoj restas en la kolonio kaj riĉe kontribuas al ĝia kresko. Ĉiuj niaj kunkolonioj ege profitis de tiaj homoj. Kaj ni ne forgesu la aliajn fontojn de ŝtata kaj privata bonhavo, lanon kaj viandon. La aliaj kolonioj ekspluatas grandegajn terenojn por produkti

tiujn valoraĵojn. La bienistoj riĉiĝas, la urboj progresas, la artoj kaj metioj profitas, la lando civiliziĝas.

“Bedaŭrinde, gesinjoroj, tio ne okazis ĝis nun en nia Okcidenta Aŭstralio.”

Lia moŝto memoris ion, kaj anticipe ridis mallonge kaj senhumure. “Eble kelkaj el vi memoras, ke en 1862 mia antaŭulo en la guberniestra posteno dungis s-ron Hargreaves veni ĉi tien kaj serĉi spurojn de oro. S-ro Hargreaves estis fakte la unua homo, kiu trovis oron en Aŭstralio. Jes, la eminenta s-ro Hargreaves faris ekspediciojn al diversaj partoj de nia kolonio, sed la sola rezulto estis lia raporto, liverita al la Reĝa Geologia Societo en Londono. Mi menciis nur la titolon de tiu raporto: *Pri la sen-ora karaktero de la rokoj de Okcidenta Aŭstralio.*”

La guberniestro humure grimacis kaj svingis la fingrojn, kvazaŭ martelo ĵus trafintus ilin, kaj kriis, “Ho ve, tio doloris!” Lia premio estis elkora ridado.

Li refoje serioziĝis; “Gesinjoroj, ni eĉ ne atingis la politikan statuson de la aliaj kolonioj: ili havas memregadon en internaj aferoj, dum ni restas en la stadio de ...” lia guberniestra moŝto ridetis, “guberniestra regado, alivorte, Okcidenta Aŭstralio estas baze regata el Londono.” Lia afabla rido dum kelkaj sekundoj skuetis lian ventron.

“Ne miskomprenu min. Mi tre volonte agas en la rolo de guberniestro, sed mi celas elimini la propran rolon! Ankaŭ mi volas, ke okcident-aŭstralianoj sin regu! Estas afero de digno kaj inda fiero, ke oni sin regu, ĉu ne?”

Ial kelkaj homoj ekaplaŭdis, kaj baldaŭ la tuta aŭskultantaro laŭte aplaŭdis.

“Dankon, dankon!” La guberniestro svingis la brakojn por peti silenton. “Sed tute serioze, vi – ni – ne atingos memregadon, dum nia ekonomio estas tiel malforta. Jen la bazo.”

S-ro Herbert suĉis kelkajn gutojn el la akvoglaso apude. “Nu, iom longa enkonduko, sed necesa, mi kredas, ke vi tute aprecu la atingojn de s-ro Forrest kaj liaj kamaradoj. Ili ne nur sukcesis pligrandigi nian mapon de la nordo de nia kolonio, ili malkovris abundon da vere bonega paŝtotereno,

milionojn da akreoj. Eble la granda evoluo de Okcidenta Aŭstralio okazos tie norde, kie ili tramarŝis malgraŭ atakoj de sovaĝuloj, moskitoj, krokodiloj, malsano, kaj grandaj topografiaj defioj. Aĥ jes, maratono inda je ilia brita sango! Eĉ la soldatoj de Aleksandro la Granda ne alfrontis tiom da obstakloj!

“Pardonu, mi reiru al la temo!” S-ro Herbert, iam ofte riproĉata pro sia emo “meandri” dum parlamentaj paroladoj, trejniis sin eviti tiun deflankiĝemon, kaj sincere bedaŭris sian pekon. “Vere, el kio konsistas la civilizitaj partoj de nia kolonio? Malgranda areo ĉirkaŭ Perto, kiun oni devis sangoperde forpreni de obstinaj barbaroj, kiuj forte penis obstakli progreson. Kelkaj havenetoj, ĉefe Albany, unu-du en la nordokcidento ĉe Roebourne kaj Geraldton, kaj kelkaj apenaŭaj vilaĝoj ĉe la norda marbordo, Wyndham, Derby, Broome. Unu malliberejo sur Rottnest-Insulo, kaj unu misia vilaĝo en New Norcia, kaj disaj misiejoj en la nordo. Kelkaj punktetoj sur la mapo de la interno, ekzemple York. Jes, ni eksportas perlamoton de la nordaj maroj kaj vendas en Londono, jes, tio vere kontribuas al nia kaso. Sed ne multon. La lanindustrio en la nordo disvastigas fortikaĵojn de civilizacio en sovaĝaj pejzaĝoj, sed ĝis nun la progreso estas modera, la tero ne aparte taŭga.”

S-ro Herbert videble plivigliĝis. “Sed nun mi kun ĝojo anoncas al vi, ke s-ro Forrest kaj liaj kamaradoj mapis vastan areon de bonega tero por starigi bovovindan industrion. Mi scias, ke riĉaj entreprenistoj en aliaj kolonioj jam volas investi en tiun regionon. Tiuj viroj ne estas filantropoj – ili investas, se ili kredas, ke ili profitos. Kaj se ili profitos, ankaŭ ni gajnos. Krome, ĉiu nova bieno sur sovaĝa tereno signifas kreskon de civilizacio.”

S-ro Herbert paŭzis. “Estas unu afero diskutenda malgraŭ ĝia delikateco. Londono akute observas, kio okazas ĉe ni. Pli specife, la Kolonia Oficejo sentas sin premata de publika opinio insisti, ke ni ...” li ektusis, kaj diris ironie, “*humane* traktu la indiĝenojn. Politikistoj kaj burokratoj en Londono ne nepre multon scias pri la cirkonstancoj en novaj kolonioj, kaj ili emas tro emfazi teoriojn anstataŭ pensi pragmate.”

Singarde lia moŝto serĉis la ĝustajn vortojn. “Hm, ni cedu, ke okazis bedaŭrindaĵoj en la setlado de tiu ĉi regiono ĉirkaŭ Perto. Sed kiel ni povintus tiujn eviti alfronte al sovaĝula rezisto? Ĉu iu homama londona politikisto povus konsili nin?”

“Kaj oni ofte aŭdas flustrojn pri ne aparte humana traktado de la aborigenoj ĉe la norda marbordo. Fakte, ne estas sekreto, ke ankaŭ tio estas faktoro en la hezito de Londono doni memregadon al nia kolonio.”

Refoje la guberniestro ektrinkis. Oni respektoplene atendis, ĝis lia agrabla baritono ree plenigos la salonon. “Mi vidas solvon de tiu problemo en la paŝtista industrio, gesinjoroj. Laŭdire la aborigenoj bonege rajdas sur ĉevaloj kaj ili ŝatas la laboron de bovpelistoj. Se ni povos starigi tiun industrion en novaj lokoj sen rezisto, jes ja, kunlabore *kun* la nigruloj, ni rajtas esperi pri nova ĉapitro en niaj rilatoj kun tiuj homoj. Eĉ Londono estos kontentigita!”

Ial la guberniestro ekridis, kaj subite ĉiuj trovis la vortojn amuzaj kaj laŭte ridis. Tiu ridado daŭris plurajn momentojn, dum kiuj la parolanto fortrinkis tutan glason da akvo. Sed fine li signalis, ke li volas diri ankoraŭ kelkajn vortojn.

“Gesinjoroj – mi preskaŭ diris *geamikoj* – mi lasis la plej bonan novaĵon ĝis nun!” Li levis sian dekstran montrofingron kaj metis ĝin al siaj lipoj, kvazaŭ perfidonte sekreton. Li eĉ parolis mallaŭte, sed aŭdeble: “Gesinjoroj, en tiuj montoj estas ... oro! Jes, s-ro Forrest konfirmis la onidiron, ke lia ekspedicio trovis tre fortajn indikojn, ke estas oro – eble en grandaj kvantoj – en la orienta ekstremo de la tereno malkovrita kaj malfermita al ni. Ĉu necesas, ke mi aldonu al tio? Mi volonte vidus la eminentan fakulon s-ron Hargreaves manĝi la paperon de sia raporto – kiel bela kroma plezuro tio estos!”

“Oro!” “Ne!” “Ĉu eblas?” “Ni trovis oron!?” “Ni riĉiĝos!”

Kakofonio de krioj kaj interjekcioj eksplodis. La guberniestro sciis pri la efiko de tiaj vortoj, kaj li gestis ambaŭbrake, kvazaŭ por diri, nu jen, vi aŭdis tion el la buŝo de la estro de la kolonio ...

Poste Billy Dixon, en hotelĉambro, skribis en sia taglibro: *Vere impona ceremonio. Kaj kia klimakso! Nun mi scias, kien mi iros. Eble mi estas senespere malbona vendisto (dankon, kara Paĉjo!), sed tio ne signifas, ke mi ne trovos oron ...*

Onklo Elmaru

La jaroj pasis rapide, kaj en la frua parto de lia vivo ĉiuj rigardis Jangabara aminda kaj talenta knabo. Li estis malpli altkreska ol liaj samaĝuloj, sed liaj relative mallongaj, fortaj kruroj moviĝis tre rapide. La patrino diris, ke la patro havis similan staturon. Se temis pri mallonga sprinto, li estis videble pli rapidkura ol la ceteraj: kelkaj venkis lin, se temis pri longa kuro. Kiel multaj el sia popolo, Jangabara ofte ridis aŭ ridetis kaj montris siajn brile blankajn dentojn, kio donis apartan ĉarmon al lia ronda, altira vizaĝo. La vorto *ĉarma* ofte venis al la lipoj de plenkreskuloj, kiuj parolis pri tiu knabo, dum li estis malgranda.

Sed poste Jangabara montris signojn de ia obstino, ia malemo sendiskute akcepti la vortojn de la Maljunuloj. Tiu maltrankviliga eco klare montriĝis la unuan fojon rilate al la deziro de Jangabara scii pli pri sia patro, la unua edzo de Majarina, lia patrino.

Li sciis nur, ke lia patro mortis, kiam li estis tre malgranda. Kiam, jarojn poste, li demandis Alimanu, unu el la Maljunuloj, pri la afero, la grizbarbulo klarigis, ke oni venĝis tiun morton. La kulpulo estis iu Tjingula el la Namubi-popolo, kiu vivis en la duondezerto preter la periferio de la Banubi-tero. Jangabara faris al Alimanu multajn demandojn: kiel Tjingula mortigis Marajanda, lian patron? Per lanco? Ne, Alimanu klarigis: Tjingula ne ĉeestis, kiam Marajanda falis kaj mortis, sed ne necesis, ĉar li uzis ian sorĉon. Sed, Jangabara volis scii, kiel la Banubi sciis, ke la kulpulo estas Tjingula? Alimanu klarigis al li, ke la spirito de la mortinta Marajanda klare indikis tion: lia kadavro sur kuŝbreto farita el maldikaj arbobranĉetoj lasis fali grandan kvanton da substanco sur la ŝtonon, kiu havis la nomon de Tjingula. Kompreneble estis aliaj ŝtonoj tie kun la nomoj de aliaj suspektatoj, sed la ŝtono de Tjingula klare pruvis lian kulpon. Nu, la obstina knabo ŝajnis ne plene akcepti tiun klarigon, kvankam ĝia valideco estis absolute klara al Alimanu kaj ĉiuj aliaj Maljunuloj. Do Jangabara persistis: kiel oni mortigis Tjingula? Ĉu per sorĉaĵo? Nu, tiufoje oni ne tute fidis la efikon de sorĉaĵo: kelkaj Banubi-viroj postspuris Tjingula kaj lin lancumis.

La kreskanta knabo nebulokule rigardis malproksimen. Evidente pensoj

kirliĝis en lia ronda kapo. Alimano jam volis foriri, kiam Jangabara demandis: “Ĉu la Namubi ne devos mortigi iun Banubi-viron por venĝi la morton de Tjingula? Kaj poste?”

Alimano estis serioze mishumora. “Knabo, se ni ne mortigos niajn malamikojn, ili nin mortigos.” Li forstamfis kolere: tiajn demandojn li neniam aŭdis, kaj ili venis el la buŝo de neinicita knabo!

Se jam kuŝis en la animo de Jangabara sparketoj da ribelo, li tamen ne estis en tiu tempo soleculo. Li amis la vivritmon de ĉiutaga marŝado, ĉasado, kaj vespera amuzado. Li dancis tre bone, kvankam lia kantovoĉo ne estis bona. Aparte li amis la prarakontojn pri la Unua Tempo kaj la evoluoj en memorata tempo.

Kiam la suno pikis, Jangabara kaj la aliaj knaboj kun granda ĝuo naĝis en la kristalklaraj riveroj. Alispeca ĝuo estis rigardi tiujn samajn riverojn dum pluvsezonaĵoj: ili ŝvelis, bruniĝis kaj forportis eĉ grandajn arbojn, kaj oni povis ĝui la spektaklon, kondiĉe ke oni restu super la akvonivelo.

Jangabara rapide lertiĝis pri spurado de homoj kaj bestoj. Foje Elmaru testis lin, marŝante malantaŭen, sed Jangabara perceptis tion: kiam oni iras malantaŭen, estas malsama premo de piedfingroj kaj kalkanoj, ol kiam oni iras antaŭen. La diferenco estas subtila, kaj postulas multe da studado. Jangabara lernis interpreti tion ĝuste, kaj Elmaru estis tre kontenta pri lia progreso. Jangabara lernis “legi” la mesaĝojn de rompitaĵoj, de apartigitaj herbotigoj, de postlasita fekaĵo aŭ de io alia faligita. Li baldaŭ sciis distingi inter la piedsignoj de diversaj homoj.

Antaŭ ĉio la kreskanta knabo amis esplori la sennombrajn kavernojn de la granda montaro. Iu spirita Antaŭulo boris tiom da pasejoj tra la montoj, kaj ili tiel interplektiĝis, ke eblis sin kaŝi netroveble dum tagoj. Eble estis la Ĉierlarka Serpento mem, kiu kreis tiun reton de kavernoj.

Pro siaj talentoj Jangabara estis akceptita de preskaŭ ĉiuj knaboj, eĉ iom pli aĝaj, kiel la neoficiala estro de la grupo. Ilia kulturo ne akceptis reĝojn aŭ permanentajn ordonantojn, sed kiam temis pri tuja tasko, ofte estis pragmata interkonsento, ke iu specifa viro decidu por ĉiuj. Evidente Jangabara, la plej malaltkreska sed plej muskolforta el sia generacio, havis la ecojn de estonta decidanto. Li mem aspiris esti simila al Elmaru.

Alimano evidente diskutis kun aliaj Maljunuloj tiun maltrankviligan konversacion kun Jangabara. Iom poste, kiam preskaŭ la tuta tribo ariĝis por celebri ceremoniojn, Alimano kaj alia grizbarbulo, Nguratu, riproĉis Elmaru pro lia malbona influo sur la knabo. Elmaru nur rikanis. La afero pri Jangabara estis nur preteksto por kritiki lin, Elmaru. Ĉiuj sciis, ke Jangabara tre admiras kaj respektas la opiniojn de Elmaru, sed la riproĉo de la Maljunuloj havis alian kialon.

Nur iom post iom Jangabara komprenis iom pri la internaj streĉitecoj en lia tribo. Ne tre ofte ĉiuj estis en unu loko. Foje nur la pli intimaj familianoj restis kune, foje estis multaj viroj kune por ĉasi kanguruojn, foje estis ceremonioj por nur unu el la kvar totemoj, foje du aŭ eĉ ĉiuj kvar totemgrupoj kunvenis. Do kvankam Jangabara preskaŭ ĉiam moviĝis kun grupo, en kiu Elmaru estris, povis okazi, ke Elmaru dum monatoj ne estis en la sama loko kiel la Maljunuloj.

Kontraste al la grizaj Maljunuloj, Elmaru estis nigrabarbulo. La Maljunuloj rigardis Elmaru danĝera ribelulo. Jam de la komenco de la mondo estis kutimo, ke la Maljunuloj rajtas monopoli la dezirindajn junajn virinojn. Junaj viroj devis kontentiĝi pri maljunaj virinoj kaj vidvinoj, ĝis ili mem kreskigos grizan barbon kaj povos elekti inter la ekscitaj junulinoj. Tiu kutimo, kaj tion ĉiuj sciis, limigis la nombron da naskiĝoj, kaj tio estis necesa eĉ sur la bona akvobenata tero de la Banubi. Sed junaj viroj ofte sentis tenton spiti al tiu kutimo, kaj fakte de tempo al tempo juna paro forkuris. Ilia puno, se oni kaptis ilin, estis preskaŭ ĉiam morto.

Elmaru, ankoraŭ viro en siaj plej fortaj jaroj, ne forkuris kun belaj junulinoj: li simple prenis ilin al si kaj rifuzis redoni al la Maljunuloj, al kiuj oni iam ilin promesis. Pluraj viroj estis malamikoj de Elmaru, sed neniu kuraĝis rekte ataki lin: tre bone oni vidis lian grandiozan staturon, kaj lia prestiĝo kiel batalanto kaj lia mensa forto estis konataj. Elmaru ne estis oficiala *kadajĉi*, sorĉulo, sed li ŝajnis pli potenca ol multaj sorĉuloj.

Neniu virino, kiun Elmaru ŝtelis, provis reiri al sia promesita edzo. Elmaru estis vera fortulo, admirata de virinoj, kaj esti elektita de li estis honoro. Aliflanke li senskrupule forsendis virinon, kiu ial ne plu plaĉis al li.

Elmaru, kvankam aroganta, ne estis memmortigema. Unu leĝon li neniam rompis: li ja prenis virinojn, kiuj plaĉis al li, sed ili devis aparteni al la du permesataj totemoj. Li mem estis de la totemo *gelani*, kaj do virino el tiu totemo (*gelanĝani*) estis absolute malpermesita al li. Nur en esceptaj kazoj *gelani*-viro rajtis amori kun *bulinĝani*, ino el la *bulini*-totemo. Elmaru ja povus amori kun *labinĝani* (de la totemo *labini*), eĉ se tio ne estis la plej bona elekto. Plej bone estus preni *nalunĝani* el la totemo *naluni*. Ĉu Elmaru kaj la Maljunuloj konsciis pri la efiko de tiuj leĝoj, neniu eksterulo rajtas scii, ĉar tiaj aferoj apartenis al la arkanaj sekretoj, sed eŭropaj sciencistoj, kiuj studis la temon, miris: la aborigenoj ja sciis eviti inceston. Elmaru ne donis al siaj malamikoj tian kialon por lin mortigi: liaj virinoj estis senescepte aŭ *nalunĝani* aŭ *labinĝani*. Ke li kaperadas la virinojn de aliaj, estigis fortan personan ĉagrenon, sed tio estis pli milda ol ilia pravigita kolero pro rompo de leĝoj transdonitaj de la Antaŭuloj. Ja, rompo de tiuj leĝoj estus io tute alia, kion Elmaru mem nomus krimo.

Elmaru jam mortigis samtribanojn en privataj kvereloj, kaj pli ol unu alipopolan viron en intertriba batalo. Ankaŭ tio estis iom nekutima. Bataloj inter triboj ĝenerale okazis sur interkonsentita ebenaĵo lime de la du tribaj teritorioj. Post longa insultado kaj mokado ambaŭflanke de viroj en timigaspektaj militfarboj, oni ekĵetis lancojn, kaj la alia flanko deturnis la akrajn bastonojn per ŝildo. Tio daŭradis, ĝis iu viro estis fakte pikita de lanco kaj lia sango fluis. Ofte tio markis la finon de la batalo, kaj la venkita flanko retiriĝis flegi la vundojn de la pikito, se li ne jam mortis. Sed Elmaru ĵetis lancojn tiel forte kaj precize: li ja celis mortigi, ne nur kontentigi la honorpostulojn de la Banubi. Lia serioza mortigemo estis timiga al eĉ liaj kamaradoj, kies militardo estis parte blufo kaj spektaklo. Jes, heroo li estis, sed herooj estas foje problemvekaj homoj.

Eble Elmaru intuciis, ke en la knabo Jangabara estas ribela animo simila al lia. Kiam lia frato Marajanda mortis, Elmaru ĉiukaze estus preninta la virinon Majarina kaj la filon Jangabara kiel la proprajn – tio simple okazis kiel memkompreneblaĵo. Perdi la patron do ne estis tia katastrofo, kia ĝi povas esti aliloke. Sed Elmaru post pli proksima konatiĝo kun Jangabara aparte ŝatis la knabon. Li decidis instrui al li valorajn lecionojn, kiujn li devis mem lerni per spertoj dum multaj jaroj.

lun tagon Elmaru rigardis grupon da knaboj ĵeti lancojn al eŭkalipta

trunko. Ofte Jangabara estis la plej bona de la grupo, sed tiun tagon li maltrafis fojon post fojo. Kutime la knabo ĵetis per glata kaj ŝajne ne fortpostula korpomovo, sed nun li kolere ĵetegis la lastan lancon plenforte kaj malgracie, kaj kompreneble maltrafis per hontinda distanco. Jangabara preskaŭ ploris pro frustriĝo.

Elmaru vokis la knabon al si. Li demandis, “Kion vi vidis en via kapo *antaŭ ol* vi ĵetis la lancojn?”

Jangabara ne bone komprenis la signifon de la demando. Li abruptis: “Nenion.”

“Ĉu vi ne vidis la lancon flugi kaj trafi la arbon?”

“Ne.” Jangabara ankoraŭ parolis iom mishumore, sed jam li ekkaptis la ideon de Elmaru. Post eta paŭzo li demandis, “Ĉu mi devas unue vidi la lancon penetri la arbon?”

“Jes, ĝuste. Iru nun kun lanco, sed ne ĵetu ĝin. Fermu la okulojn kaj imagu, ke vi ĵetas perfekte kaj la lanco restas skuetiĝante en la arboŝelo. Iru kaj ne ĵetu, ĝis mi venos al vi.”

Jangabara plenumis la instrukcion. Lia humoraĉo jam pasis, kaj li obeeme vidis per fermitaj okuloj sian sukcesan ĵeton. Li turnis sin al la granda fortulo. “Onklo Elmaru, ĉu mi ĵetu nun?”

“Mi diris, ke vi atendu, ĝis mi venos. Vidu la bonan ĵeton en via kapo multfoje.”

Tiom da fojoj la knabo faris, kion li devis, kaj ankoraŭ Elmaru ne venis. Jangabara sentis tenton rezigni pri la eksperimento. Sed fine la grandulo malrapide alpaŝis la knabon kaj diris, “Vidu lastan fojon tiun bonan ĵeton, sed vidu ĝin tre klare.”

Kiam Jangabara tion faris, Elmaru diris, “Kaj nun, filo Jangabara, sen tre streĉi viajn muskolojn, ĵetu, kaj dume vidu en via kapo la lancon trafi la arbon.”

Jangabara ĵetis, kaj la lanco senpene traarkis la spacon kaj restis fiksita en la arbo.

“Vidu, jen la sekreto. Faru tion ĉiufoje.” Kaj Elmaru formarŝis.

Ekde tiam Jangabara ĉiam plenumis tiun riton. Ĉu li ĵetis ŝtonon aŭ lancon, malofte li maltrafis. Lia supereco estis tiel klara kaj baldaŭ akceptita, ke ĝi ne plu vekis ĵaluzon inter la kamaradoj.

Baldaŭ li uzis la saman principon pri multaj aktivaĵoj, ĉu temis pri kaptado de fiŝoj per lanco, ĉu pri la plej glata maniero rapide kaj sekure grimpi sur arbon, ĉu pri maniero postspuri homon aŭ beston.

Alian valoran lecionon Elmaru donis al sia favorato iun tagon, kiam pinto de branĉo pikis brakon de Jangabara kaj sango elŝprucis. La knabo kriis pro doloro, dum la sango fluis laŭ lia bicepso. Elmaru diris abrupte, “Ne tiel, knabo. Rigardu.”

Jangabara rigardis surprizite, dum Elmaru prenis la saman branĉon kaj sangoŝprucige pikis la propran bicepson. Li lasis fali la branĉon kaj tuj ĵetis la manon de la alia brako sur la pikvundon, fermis la okulojn, kaj ŝajnis pense iri al alia mondo. Post nelonge li malfermis la okulojn, forprenis la manon de la vundo, kaj montris la pikitan brakon al Jangabara. Je la granda miro de la knabo neniu sango fluis, kaj videblis nur eta spuro de la vundo.

“Onklo Elmaru, kiel vi faris tion?” demandis Jangabara, laŭ kies brako ankoraŭ fluis sango.

“Aŭskultu bone, knabo. Mi mem ne komprenas, kiel la afero funkcias, sed vi povas sanigi vundon aŭ brulon aŭ ĉesigi doloron, se vi tuj almetas vian manon kaj en via kapo vi faras tre klaran bildon de la saniĝo aŭ la ĉeso de doloro. Sed ekzercu tion de tempo al tempo *antaŭ ol* vi ĝin bezonos. Se vi faros tion, ĝi estos tre utila al vi.”

Dirinte tion, la altkreska sorĉulo foriris. Li rifuzis respondi al pluaj demandoj. Se Jangabara ne plenumos liajn instrukciojn, la knabo ne evoluigos la potencojn, al kiuj la ceteraj Banubi atribuis sorĉopovon. Sed ju pli la knabo mem spertos kaj pensos, des pli bone.

Elmaru povis iom eniri en la animon de Jangabara, same kiel en la

animojn de multaj aliaj homoj, kaj li fidis, ke la talenta knabo estos iam potenca batalanto kaj defendanto de la Banubi. La strangaj palhaŭtaj fremduloj invadis pli kaj pli da tribaj teritorioj kaj asertis posedon de ili. Kiu povus kontraŭstari tiun invadon?

Baldaŭ Elmaru mem spertos multon ĉe la invadantoj.

Billy kaj Roger

El la taglibro de Billy Dixon:

Mi volonte ekirus tuj al la orminejoj, sed estas du problemoj: neniŭ scias, kie estas tiuj orvejoj, kaj due mi devas antaŭe enspezi iom da mono por financi mian ekspedicion.

Bonŝance mi trovis laboron preskaŭ tuj. S-ro Johnson, la posedanto de la Hotelo Cigno, ĵus maldungis kelneron pro “fordrinkado de la profitoj”. Kiam mi min prezentis, li diris simple, “Ĉu vi tre ŝatas bieron?”. Mi respondis, “Ne multe.” Kaj li anoncis, “Vi estas dungita.”

Mi kredas, ke mia altkultura angla akĉento imponas al li. Lia propra estas aŭstraliane kruda, sed li insistas, ke li estas anglo. Per tio li volas emfazi, ke li migris kun siaj gepatroj el Anglio, kiam li estis nur trijara. Liaj gepatroj sukcesis aĉeti kelkajn hotelojn en Viktorio kaj prosperis, do s-ro Johnson venis ĉi tien kaj akiris tiun ĉi hotelon, la plej grandan en Perto. Ankaŭ li bone fartas finance, ŝajnas al mi. Viroj ne ĉesas soifi nur pro tio, ke la ekonomio ne bone statas – aparte en tiuj ĉi kolonioj, se la rakontoj estas kredindaj. Multaj homoj drinkas pro enuado, miaopinie. Jen ilia tempopasigilo en tiu ĉi dormema anguleto de la Imperio.

Malmulto okazas ĉi tie. La akcepto de la ekspedicianoj estis vera escepto al la rutino, kaj mi ĝojas, ke mi povis ĝin partopreni.

Virinoj? Kial mia lango tiel stumblas, kiam mi estas proksima al virino? Mi vere volas komenci seriozan rilaton kun ino, sed mia memfido plonĝas en la ĉeesto de la ulinoj. Kaj ŝajnas al mi, ke konvenaj junaj virinoj vivas tre “monaĥine” ĉi tie, en sia vasta vestaro kaj kun tia mieno, ke oni kredus, ke peka penso neniam enirus ilian kapon. La sama snobeco kiel en Hindio estas grandparte trovebla en Perto. Mi ne tute atingas la statuson de “ĝentlemano”. Se mi estus Kavaliro William Dixon, la afero status tute alimaniere. Mi supozas, ke mia Pater havas pli da mono ol multaj lordoj, sed nia mono estas “nova”—nia familio devos atendi ankoraŭ kelkajn generaciojn por vere aparteni al la supra klaso. Kompreneble estas aliaj virinoj, kiuj sin disponus al mi, inter ili specimenoj de “nigra veluro”. Dio

malpermesu, ke mi iam tiel maldigniĝu!

Nu, se mi trovos multe da oro, ĉu mia vivo ŝanĝiĝos? Mi vetas, ke jes!

Senrilate al la temo: la cignoj, kiuj donis sian nomon al tiu ĉi bela kaj larĝa rivero – kaj tiu ĉi hotelo! – estas nigraj! Unue mi kredis, ke miaj okuloj misfunkcias, aŭ ke iu ilin tinkturis. Sed nun, kiam mi rigardas ilin drivi sur la rivero, mi trovas ilian brilan nigron same bela kiel la blanko de la hejmaj cignoj.

Ne multon legis lastatempe. Iomete da Tacitus (severa sinjoro, tiu), kelkajn poemojn de Byron, kaj libron de Herbert Spencer, kiu devas esti la plej eminenta sciencisto-verkisto de nia tempo. Liaj vidpunktoj rilate antropologion estas fascinaj. Pri la nigruloj de tiu ĉi kontinento li skribas kaŭstike:

En la lingvoj de la aŭstraliaj indiĝenoj ne ekzistas vortoj, kiuj tradukus justeco, peko, kulpo. Inter la malsuperaj rasoj, malavaraj aŭ kompataj agoj estas absolute nekompreneblaj. Tio signifas, ke ili ne havas koncepton de pli kompleksaj rilatoj de homa agado en ĝia socia kadro.

Tio sendube pravas. La nigruloj vidataj ĉe la periferio de Perto estas senespere mizera grego. Iam, se la rakontoj estas fidindaj, ili rezolute batalis kontraŭ ni, sed la fusiloj de la civilizitaj homoj reduktis ilin al plorinda stato. Nu, Darwin diris, ke la plej malfortaj devas cedi kaj malaperi. De tempo al tempo mi vidis tre belstaturan nigrulon kun ŝvelaj muskoloj, sed vestitan en ĉifonoj (mi supozas, ke ili aspektus pli bone sen vestoj, kiel ili iam vivis). Sed tiuj belaj specimenoj estas la esceptoj, kaj malfacile oni kompatas la mizerulojn, kiuj eble plej profitus, se oni donus al ili kuglon inter la okulojn.

La iro de la Universo estas sendube kruela, kaj tiu ĉi primitiva raso estas mortkondamnita. Sed kian bonon ili iam ajn atingis? Ili eĉ ne kultivas la teron. Ili simple vagadas kiel sovaĝaj bestoj kaj predas tion, kion ili povas manĝi hodiaŭ. Ili havas nenian koncepton pri ŝparado, ke ili havu dum malbona sezono, nenian teĥnologion, nenion por interkomerci, nenion, kion penvalorus savi. Kaj, krome, Spencer skribis, ili estas subnivelaj intelekto kaj morale. Ne, mian kompaton mi direktos al pli inda celo.

Billy diligente laboris por s-ro Johnson kaj ŝparis monon. Lia salajro estis tre modesta, sed ĉar li loĝis senpage en la hotelo kaj ĉar li malofte trinkis alkoholon, li povis flankenmeti kelkajn ŝilingojn ĉiusemajne, kaj li revis pri la tago, kiam li surŝipiĝos kaj ekveturos norden al haveno plej proksima al la orminejoj. Ĉar li estis tute sensperta pri la aŭstralia boŝo, kaj neniam fosis en la tero, li ne simple forsprintos sola serĉi oron. Sed tuj, kiam iu alia spertulo trovos la valoran metalon, li ja forrapidos.

Li devis pasigi kelkajn jarojn en Perto. Dume li ŝparis iom da mono, sed neniel progresis en sia “intima vivo”, kiel li ĝin nomis. Kiel li povus trovi la ĝustan virinon, kiel li entute rilatu al virinoj? Ĉu li estis tro legema, klerema? Ĉu li havis nerealisme altajn postulojn kaj aspirojn pri la virino, kun kiu li volas rilati? Kelkaj komence ŝajne promesdonaj ekrilatoj montriĝis efemeraj. Ĉu estis lia sorto resti soleca fraŭlo? Li esperis, ke ne, sed ŝajne ne povis ion entrepreni. Ĉu li devis pacienci, ĝis tiu ideala virino venos de si mem en lian vivon, aŭ ĉu viro devas preni la iniciaton?

Kaj tiam venis kaj rapide disvastiĝis la ekscita informo. Oro estis trovita en loko nomata Hall’s Creek. Billy tuj ekaĉetis parton de la materialo rekomendita al li de maljunulo, kiu trovis iom da oro en Kalifornio en 1849, kaj poste en Bendigo en Viktorio. La manko de spertoj kaj scioj tute ne malakrigis la fervoron de Billy. Dum tuta semajno li devis frustrate atendi ŝipon veturontan norden.

“Vi povos atingi Hall’s Creek aŭ el Derby aŭ el Wyndham,” diris la grizbarba eksministro. “Mi rigardis la mapon. El Derby estas 600-mejla ¹ marŝo trans relative ebena tereno, kaj estas kelkaj ŝafbienoj survoje. El Wyndham la distanco estas nur 400 mejloj ², sed la pejzaĝo estas monta kaj ŝtona. Se mi estus vi, mi irus de Derby.”

Do Billy decidis elŝipiĝi en Derby. De tie nur 600 mejloj apartigus lin de riĉula feliĉo.

Sed kiam li surŝipiĝis, estis malagrabra surprizo konstati, ke li ne estas la sola kun tiaj revoj. Centoj da viroj iros, ĉiuj kun la sama ambicio: instruistoj, bankdungitoj, advokatoj, ĉarpentistoj, butikistoj, metiistoj, preskaŭ ĉiu socia tavolo estis reprezentata. Estis eĉ kelkaj forpelitaj

ekspastroj el Anglio kaj unu-du malriĉaspektaj lordoj.

Ili forveturis de Fremantle, la haveno de Perto, kaj preteriris la insulon Rottnest, teruran ekzilkon por kondamnitaj. Oni diris al Billy, ke pli kaj pli la loĝantoj sur tiu muŝoturmentata insulo estas aborigenoj el la tuta kolonio: ilia plej ofta krimo estis mortigo de ŝafoj kaj bovoj de bienistoj.

La malnova malamiko de Billy, marmalsano, baldaŭ transprenis. Li estis malsana dum granda parto de la vojaĝo, kaj li apenaŭ rimarkis, ke la marbordo kaj la malfekundaj montetoj daŭre glitas suden. Li ja rimarkis kun maltrankvilo, ke ĉiufoje, kiam ili haltas ĉe haveno, pli da viroj surbordiĝas, kaj evidente kun la sama misio kiel li. Dum ili preteveturis la Golfon de Ŝarkoj, li vidis, ke la nomo tre pravas. Li skuetiĝis, rigardante tiujn suprajn kaj mortigajn marbestojn. Ne, neniam li amis la maron, kaj li ĵuris al si uzi ŝipon kiel eble plej malofte. Sed marŝi surtere en Okcidenta Aŭstralio, kun tiuj neimageblaj malplenaj mejloj, estis ne nur elĉerpe kaj multekoste, sed grandgrade danĝere, se pravis la multaj rakontoj aŭdataj en Perto. Ne nur malsato kaj soifo minacis, sed en kelkaj lokoj la nigruloj iĝis pli kaj pli atakemaj.

Ie inter Roebourne kaj Broome Billy denove vomis ĉe la ferdekbarilo. Li staris tie, kaj fakte eksentis sin iomete pli bone, kiam alia maldika, altkreska viro impetis al la barilo kaj elgorĝigis sian manĝon tuj apud Billy. La flave bruna elkraĉaĵo arkis iom for de la ŝipo kaj plaŭde malaperis en la senfinan maron. Fininte, almenaŭ provizore, la viro turnis sin al Billy, ridetis per torditaj trajtoj, kaj diris, "Mia plezuro vin renkonti, oldulo. La karaj gepatroj donis al mi la nomon Roger." Lia akĉento venis el iu regiono de Kent! Roger gestis al la vastega akva mondo kaj komentis, "Sciu, ni britoj estas nun lordoj de la planedo. Mi supozas, ke tio rajtigas nin vomii en ĉies ajn akvon."

"Mi devas diri, ke via prezentaĵo estis pli eleganta ol mia. Oni nomas min Billy."

La du tremgenuaj junaj viroj manpremis, kaj ambaŭ intuciis, ke ili estos partneroj en tiu ĉi stranga aventuro. Preskaŭ ĉiuj viroj sur la ŝipo nomis iun "kamarado", kaj laŭsperte tia kamaradeco povus esti nepra por

pretervivi en la sovaĝejoj de la nekonata kontinento.

Finfine ili atingis la alirejon al Derby, havenon parte terĉirkaŭitan. Evidente estis tre granda diferenco inter la niveloj de fluso kaj malfluso. Tio prokrastis la surbordiĝon – sed ankaŭ la fakto, ke ilia ŝipo estis nur unu el kvin, kiuj atendis por surterigi kargon kaj homojn. Billy havis la impreson, ke granda parto de la tuta loĝantaro de la kolonioj kaj de Nov-Zelando, kaj krome dekoj da alilanduloj, atendas por surpaŝi la ĝeton.

Kiam fine ili staris sur la tero, Billy kaj Roger sin rigardis kun nekredemo: ie tie, kelkajn mejlojn for, estis Derby, sed unue necesis travadi fetorajn koto-ebenaĵojn. Centoj da viroj malrapide trenis sin al la vilaĝo.

Kaj kiam ili atingis ĝin, Roger grimacis, “Kaj tio estas loko, kie homoj vivas sen juĝista verdikto?”

Tamen ili konstatis, ke io okazas en Derby. La “or-febro” venigis monon al la loko, kaj oni estis konstruanta ege rudimentajn hotelojn. La plej malnovaj domoj estis primitivaj kunmetaĵoj el arbotrunketoj kaj arboŝelo. “Apenaŭ pli bonaj ol tranoktejo de aborigenaj nomadoj,” diris Roger.

Kaj la varmego, la muŝoj, la moskitoj! La plej bona domo apartenis al Fratoj Adcock, du entreprenemaj viroj alvenintaj antaŭ nelonge por ekspluati la hordojn fluantajn en la dezerton por serĉi sian Eldoradon. La Adcock-fratoj luis tutan ŝiparon por transporti materialojn ĉiuspecajn el Perto, Darvino, eĉ Brisbano. Ilia butiko aspektus averaĝe bona en malriĉula kvartalo de Perto, sed tie ĉi, diris Roger, ĝi estas “Templo de Civilizacio”.

Unu el la ĉefaj aĉetotaĵoj estis durada ĉaro kun du iom longaj timonoj. Unu viro povis ĝin tiri – aŭ puŝi, sed tio estis pli peza – sed la laboro estis multe pli facila, se du viroj tiris po unu el la timonoj. Sur la plataĵon de la ĉaro ili povos stakigi siajn aĵojn, kvankam ili preferis porti siajn plej intimajn aferojn, ekzemple taglibron kaj monon, en dorsosako.

Alia nepraĵo estis larĝgranda ĉapelo.

Ili devis elekti kunporteblan provianton. Salumita bovaĵo, faruno, kelkaj sekigitaj fruktoj, kaj rizo estos iliaj ĉefaj manĝaĵoj dum semajnoj. Se ili bone progresis, ili iros pli-malpli dudek mejlojn ³ tage. Antaŭvideble ili

devos de tempo al tempo ripozi, do la marŝado daŭros minimume unu monaton.

Rilate akvon ili devis esperi trovi ĝin survoje.

Roger kaj Billy bezonis longan tempon por elekti siajn aĉetaĵojn, kaj devis longe atendi por pagi. La butikoj estis sufoke plenplena, kaj la du diligentaj fratoj ŝvitis en siaj klopodoj servi al ĉiuj klientoj kiel eble plej rapide. Unu el la plej dezirataj artikloj estis kontraŭmoskita maŝaro. Eĉ en la butikoj tiuj etaj turmentinsektoj rampis sub dikan pantalonkruron por piki viktimon, aŭ trovis lokon sur la nuko. “Moskitoreto”, kiel oni nomis la aferon, kostis la ekvivalenton de dusemajna salajro en Perto. Sed ne eblis rifuzi pagi – centoj da aliaj klientoj volis aĉeti.

Fine la aĉetado finiĝis. Ili devis paciencie bori al si irvojon tra multaj korpoj, trenante la aĉetaĵojn, kaj eskapi el la spirhaltiga butikoj. Ili troviĝis sur la sola strato, ege larĝa, ebena kaj seninteresa. Iomete for de la linio de la stratdomoj estis alia konstruaĵo, kiu similis serion da haste starigitaj ŝedoj. Multaj viroj ĉirkaŭis la ejon, kelkaj malrapide marŝante kaj provante vidi ion internan. Grandkorpa viro staris ĉe la sola pordo kaj evidente marĉandis kun unu el la apudaj viroj, ulo kun larĝgranda ĉapelo. Billy vidis geston, kiu klare signifis, ke la du viroj atingis interkonsenton, kaj la ĉapelporta viro volis eniri la domon. Virino kun nuda torso aperis ĉe la pordo kaj geste invitis lin.

“Sendube vi rekonis la ĉi-lokan version de Templo de Venera, oldulo?” diris Roger.

Eĉ la naiva Billy komprenis la negocon. “Ne por mi, dankon!”

“Ĉu vi, hm, emas alidirekten?” demandis Roger.

“Ne, absolute ne.”

“Nu, ni scias, kiel statas la aferoj. Miaflanke mi, nu, mi povas moviĝi ambaŭdirekten,” trenvoĉis Roger.

“Sed ne kun mi. Ĉu tio estas klara?” Billy subite konsciis, ke lia tono povas tre simili tiun de la pruda patro.

“Je Jupitero, via voĉo memorigis min pri mia kara generinto,” diris Roger kun afabla rideto.

Billy devis ridi. Do ankaŭ Roger devenis el tia familio! Ja, li ŝatis tiun maldikan, longabrakan rufharulon el Kent kun la bona edukado kaj la plaĉe ironia vortelekto. Li antaŭvidis, ke senso por humuro povus esti nepre sur la vojo tra Purgatorio al la Paradizo de or-riĉuloj.

Nek Billy nek Roger, nek la centoj da aliaj ĵus alvenintoj interesiĝis pri Derby mem. Ĝi estis simple la lasta vilaĝo survoje.

Post vizito al la butikoj de la Fratoj Adcock preskaŭ ĉiuj serĉis lokon por tranokti. Certe estis sufiĉe varme por dormi substele, kaj la sperto instruis, ke post sunsubiro la muŝoj perdos sian ĝenan energion. Sed la moskitoj daŭrigos sian turmentadon tutnokte.

Multaj el la estontaj milionuloj starigis sian moskitoreton sub arbo kaj preparis sian dormolokon. Aliaj indulgis sin per lasta dormo en lito en ĉambro, antaŭ ol ekos la Granda Marŝo.

Kelkaj fortvoluloj eĉ decidis jam ekiri kaj tiel antaŭi la ceterajn en la konkuro al la oro. Ili sciis, ke Hall's Creek troviĝis ie tie oriente. Do ek, en la vesperon! Nur 600 mejlojn ili devis meti malantaŭ sin.

La taglibro de Billy Dixon ne informas pri la marŝo de Derby al Hall's Creek. Probable li estis tro laca por skribi. Li devis uzi sian energion por aliaj aferoj. Kiam li kaj Roger ekiris el la hotelo, inter centoj da viroj, ili havis malantaŭ si tutan nokton da bona ripozo, kaj verve paŝis direkte al la tiel sopirata celo, kaj la ĉaro ŝajnis sekvi ilin sen klopodo iliaflanke. Post tri horoj iliaj paŝoj estis jam malpli longaj kaj malpli rapidaj, kaj la ĉaro iĝis ĉiam pli peza.

Ili baldaŭ interkonsentis, ke marŝi dum la horoj, kiam la suno bruligas ilian haŭton kaj ŝanĝas ilian salivon en paperecan bulon, estas evitende. Necesos ekmarŝi kiel eble plej frue matene, ripozi ie en ombro de tagmezo ĝis almenaŭ la tria posttagmezo, kaj refoje marŝi kiel eble plej

longe.

Post la spertoj de la unua vespero ili tamen decidis, ke necesas halti kaj elekti dormolokon, dum ili ankoraŭ vidas. Tiun unuan vesperon ili marŝis, ĝis nenio plu videblis, kaj haltis sub arboj. Post kelkaj minutoj ili sentis dolorajn piketojn sur la kruroj kaj maleoloj: ili troviĝis sur nesto de miloj da formikoj. Iliaj alumetoj donis tre malfortan lumon kaj necesis atendi, ĝis la luno leviĝis kaj donis sufiĉe da lumo, ke ili almenaŭ iom vidu la ĉirkaŭaĵon kaj elektu lokon sen formikoj. Necesis starigi la moskitoretojn, iom manĝi, kaj malstreĉiĝi.

“Je Herkulo, mi esperas, ke tiajn formikojn ni ne plu renkontos,” diris Roger, oscedante.

“Jes, iom purgatoria loko, tiu.”

“Billy, vi uzis la vorton Purgatorio almenaŭ tri fojojn hodiaŭ. Ĉu vi apartenas al la unu sankta katolika roma firmao?”

“Ne, oni edukis min en la anglikana eklezio, la plej alta sekcio.”

“Do anglo-katolika vi estas?”

“Teorie, jes. Mi kredas, ke restas spuroj de la doktrinoj ie en mia menso. Sed mi ne estis en preĝejo dum multaj jaroj. Kaj vi?”

“Mia familio estas agnostika, krom ke ili kredas je la Dio de akcioj, buĝetoj, kaj dividendoj. Tio ne aparte nutrus mian mizeran animon, se mi havus animon.” Li laŭte oscedis. “Vere, oldulo, min naŭzas la mondo de komerco kaj financo. Kaj divenu, kian laboron mi faris en Roebourne.”

“Bankrabisto?”

“Nur naŭdek procente ĝuste! Ne, fakte mi staris aliflanke de la barilo.”

“Do vi estis dungito de banko?”

“Kredu aŭ ne kredu. Vi povas imagi, ke mi ĝojis, kiam oni trovis oron. Mi nepre volis eskapi el tiu papera ekzisto. Se mi havus religion, eble budhismo altirus min. Ili diras, ke la tuta materia mondo estas iluzio. Bele

estus ...” kaj Roger refoje oscedis.

Billy fingromontris al la belega nokta ĉielo. “Kiam vi vidas tion, mi sentas aŭ, ke mi estas nenio kompare kun la galaksioj kaj estas absurde ligi la Universon al niaj etaj doktrinoj, aŭ ke devas esti ia Forto, kiu kreis kaj ordigas la tuton.”

“Sciu, la nigruloj havas multajn rakontojn pri tiaj temoj. Fakte, ili estas multe pli religiaj ol ni.”

Billy ridis. “Ne lasu episkopon aŭdi tian herezaĵon!”

“Mia ĉefa informfonto estis pastro, kiu vivis dum jaroj inter aborigenoj en Kvinslando. Li rezignis pri konvertado, ĉar li fine konkludis, ke ilia spirita vivo estas pli riĉa ol lia. Li diris, ke por ili ĉio estas religio – ili ne dividas la vivon en apartajn fakojn, laboro tie, scienco tie, amuzaĵoj tie, filozofio tie, kaj religio en alia fako.”

Billy diris, “Vi parolas serioze ĉi-foje. Mi ŝatas tion – senfina ironio malebligas proksimiĝon. Sed ... nu, fakte, mi komencas povi imagi, kion vi volas diri. Sed Spencer skribis, ke la nigruloj ne havas vortojn por justeco aŭ kulpo aŭ peko. Do ilia religia sento devus esti malprofunda, ĉu ne?”

La voĉo de Roger perfidis dormemon, “Kial? Eble ili ne bezonas niajn kategoriojn de peko ktp. Eble ili estas panteistoj kaj ne ligitaj al niaj fiksjaj okcidentaj konceptoj de peko kaj puno. Mi ne scias ... Sed estu bonulo, mia kara, kaj lasu min dormi, bone? Ni ja havos kelkajn minutojn por babili dum la venontaj tagoj. Mi nun glitas en la brakojn de Morfeo. Belajn sonĝojn.”

“Bonan nokton, Roger.”

La postan tagon ili vidis la unuan tombon. Kruda kruco markis la eternan restejon de iu.

Ili renkontis ankaŭ “revenantojn”, stumblantajn maldikulojn en ĉifonoj, kies nenature brilaj okuloj eble vidis fantomojn – aŭ estis simptomoj de

malario. Demandite, la homvrakoj murmuris pri senakva tero aŭ danĝeraj nigruloj aŭ malsano. Oro? Nenia spuro, almenaŭ laŭ ilia scio. Eble iu trovis kaj bone kaŝis.

La vero estis, ke multaj el tiuj revenantoj eĉ ne atingis Hall's Creek. La doloroj kaj danĝeroj fortimigis ilin survoje. Ili estis molmanaj viroj daŭre vivintaj en urboj. Sed ili plej probable postvivis. Multaj ne. Ju pli Billy kaj Roger antaŭeniris, des pli da tomboj ili vidis.

En unu loko ili vidis persune bruligitan kadavron. Ĝuste en tiu momento videblis neniu homo antaŭ aŭ malantaŭ ili.

Roger streĉis sian vidpovon en ĉiun direkton. "Ŝajnas, ke la ulo apartenas al ni, mia karulo. Jen nia bonŝanco hodiaŭ. Ni devos lin enterigi."

"Ĉu vere?" demandis Billy. "Kial ne simple ŝovi flanken de la pado?"

Roger aspektis pli serioza ol kutime. "Ĉar, mia kara, se mi mortos, mi esperas, ke vi ne lasos min kiel predaĵon de sovaĝaj bestoj. Mi certe ne lasus vin. Venu, ni trovu se eble molan teron kaj kovru la kompatindulon."

La laboro vere naŭzis Billy. La fetoro de la rapide putranta korpo preskaŭ vomigis lin. Muŝoj formis nubon ĉirkaŭ li, sed eĉ pli multis sur la kap-aperturoj de la mortinto. Sed Roger pravis, kiel Billy iom honteme konfesis al si.

"Ĉu ni starigu krucon?" Billy demandis.

"Mi kredas, ke la kompatindulo tion preferus, oldulo."

"Sed eble li tute ne estis kristano."

"Ja povas esti. Sed la kruco ne plu estas nur religia simbolo. Ĝi estas ankaŭ ... kiel mi diru ... kultura simbolo, esprimo de identeco. Ĉu vi ne konsentas?"

"Do ĉu ni luktu por iel fiksi lignan trabon al alia? Se ni ne farus bone, la tuto disfalos post nelonge," Billy diris, ankoraŭ serĉante pretekston por eviti tiun taskon.

“Neniu problemo, mia kara. Ni faru horizontalan krucon el ŝtonoj. Laboro de tri minutoj.” Li humure-grimace levis la suferantajn piedojn. “Ne mankas ŝtonoj ĉi tie.”

Ambaŭ estis tre lacaj post tiu peza laboro sub la senkompata suno. “Ĉar vi nur pensas sed ne diros ĝin, oldulo, mi diru: dank’ al tiu amuza tasketo ni perdis du horojn da marŝado.”

“Jes, miaj ripoj doloras pro troa ridado,” grumblis Billy. “Do ni iru mejlon de tiu ĉi abomeninda loko kaj ripozu. Mi estas damne malsata. Mi sopiras al nia seka pano. Sed unue ni bezonos martelon por ĝin moligi.” Tiam muŝo invadis lian buŝon. Li kolere kraĉis kaj provis forbati la svarmon per fortaj mansvingoj. “Mi amas tiujn muŝaĉojn – ili fortimigas la moskitojn,” Billy mishumore elbuŝigis.

Roger ridis tiel elkore, ke fine ankaŭ Billy devis kunridi. Post manĝo, dormeto, kaj ripozo ili formarŝis orienten. Refoje eblis kredi, ke ili tamen trovos oron. Tio transformos ilian vivon.

Ulgangulura

Elmaru havis la reputacion esti *kadajçi*. Oni kredis, ke li kapablas legi la pensojn de aliaj. Certe li estis neordinara homo.

Alia eco de Elmaru, kiu distingis lin de liaj samtribanoj, estis lia konvinkiĝo, ke la blankula invado de la teritorio de aliaj aborigenaj triboj ne povas esti ignorata de la Banubi. La diversaj triboj vivis en speco de mensa geto: la sorto de la aliaj, krom se temis pri proksimaj parencoj, estis indiferenta.

Elmaru ne vidis la aferon tiel. Li estis bone informata pri eventoj okazantaj eĉ je kelka distanco de la Banubi-tero, kaj li bone komprenis la danĝeron de tiu senhalta antaŭeniĝo de fremdaj homoj kun absolute fremdaj pensmanieroj, homoj sen scio kaj kompreno pri sanktaj lokoj. Elmaru spektis de sia turalta rokmontara gvatejo la starigon de blankula bieno sur la teritorio de la Ungabadi tre proksime al la montoj mem. La bieno havis la nomon Ulgangulura. Tiu nomo estis blankula misaŭdaĵo: kreskis tie bela flava floro, kiun la Ungabadi nomis *ilgangatura*, sed la orelo de la blankhaŭtulo, kiu registris ĝin, ne estis lerta por distingi. Kaj eterne restos tiu misa nomo, Ulgangulura. Sed ke blankulo eĉ provis konservi aborigenan nomon, estis io nova.

El la vidpunkto de eŭropa bienisto la situo de Ulgangulura estis idilia. Ĝi nestis preskaŭ sub tiu multcentmetra rokmontaro, kaj apude estis gorĝo, kie rivero dum la jarmilionoj traboris al si oblikvan vojon tra la montoj. Ĉe la fino de la gorĝo estis larĝa etendaĵo de la akvejo, ideala loko por naĝi aŭ trinkigi homojn kaj bestojn. La flankoj de la gorĝo havis dekojn da kavernoj, kio unuavide aldonis al la pentrinda belo de la scenejo. Sed pro kurbiĝo de la kanjono oni apenaŭ vidus la gorĝon, krom se oni starus tre apude. La ekspedicianoj de Forrest ne vidis ĝin.

Kaj la Banubi kaj la Ungabadi, kies teritorioj havis tie sian komunan limon, nomis la gorĝon Bandjina. Tiu loko ludos gravan rolon en la vivo kaj morto de Jangabara, sed ankaŭ ĝi suferis lingvan atencan, kaj oni konservos ĝin skribe kiel "Bindjana".

Antaŭ ol s-roj Larkin kaj Brown ekkonstruis la biendomon ĉe “Ulgangulura” (ekde nun ni rezignu pri la citiloj), aliaj bienistoj jam dum jaroj funkciigis ŝafbienojn en la granda terpeco inter la maro kaj la oficiala registara limo de Ulgangulura. La Ungabadi unue provis rezisti la uzurpon de tiu tero, sed post kelkaj masakroj faritaj de blankuloj, helpate de aborigenoj el la sudo de la kolonio, estis klare, ke la tribo ne povos sin defendi. La Maljunuloj inter la Ungabadi intertraktis kun la sintrudintoj kaj akceptis kompromison: la bienoj restos, sed tribanoj rajtos loĝi ĉe la bienoj (en kabanoj apud la kampoj, kie oni brulstampis la ŝafojn) kaj ricevi minimumon da manĝaĵoj kaj tabakon. Kompense ili laboros por la bienistoj. Neniu eĉ menciis pagon pro tiu laboro, kaj ĉiukaze mono estis tute fremda al la Ungabadi. Almenaŭ en la regionoj de Derby kaj Wyndham portado de vestoj estis deviga: la blankuloj insistis pri deca konduto, kaj ne imageblis, ke nudaj homoj dece kondutas.

La interkonsento estis tre favora al la bienistoj. Ili nepre bezonis la helpon de la aborigenoj, kiuj nombris multoble tiom, kiom la eŭropanoj, kaj estis multe pli da laboro, ol la malmultaj blankuloj povis fari. Krome la Ungabadi-virinoj dume kontentigis la seksumdezirojn de la blankaj viroj. Nek la blankuloj nek la aborigenaj viroj vidis ion hontindan en tiu aranĝo. La virinojn oni ne konsultis. Tiu situacio draste ŝanĝiĝis, kiam alvenis la edzinoj de la bienistoj kaj de la dungitoj.

La Maljunuloj de la Ungabadi opiniis, ke ili faris bonan negocon. Ili insistis pri sia rajto foriri de tempo al tempo pro ceremoniaj kialoj, kaj la manpleno da blankuloj nek povis nek vere volis malhelpi tion. Almenaŭ ne komence. Poste estos kelkloke vipado pro “nepermesita neĉeesto”, sed ankoraŭ ne. Kompreneble ili devis surmeti malnovajn blankulajn vestojn, kaj baldaŭ la maljunaj Ungabadi, kies korpoj ne plu estis elastaj kaj altiraj, eĉ preferis kovri la korpon.

Krome, ĉar la ŝafoj grandparte forpelis la kanguruojn kaj ĉar la manĝaĵoj de la blankuloj ne tre satigis, la aborigenoj regule mortigis ŝafon kaj buĉis ĝin sen konsento de la mastro. Ju pli avare la bienisto disdonis manĝaĵojn kaj tabakon, des pli da ŝafoj li perdis.

Elmaru foje surpaŝis la teritorion de la Ungabadi kaj partoprenis en la buĉo de ŝafoj. Li havis parencojn inter la Ungabadi, kaj tio donis al li sekurecon. Li sciis, ke se li enirus la teritorion de la duondezertuloj, la

Namubi, estus vera danĝero, ke oni lin lancumos. Kiam la Ungabadi ridis kaj ĝojis pri la facileco kapti kaj mortigi tiujn stultajn gregemajn bestojn kaj komparis tion kun la granda peno postĉasi kanguruojn, Elmaru kunridis, sed sekrete li pensis, ke tio estas malgranda bonaĵo kompare kun la perdo de la propra tero kaj akvo. Se iam la blankuloj provos eniri la gorĝon Bandjina, li organizos reziston.

S-roj Larkin kaj Brown esperis kopii la aranĝojn de la ŝafbienistoj. Ili bone sciis, ke la Banubi havas reputacion de timindaj batalantoj – kaj tiuj multaj dumetraj viroj kun ceremoniaj cikatrostrioj sur la muskolplenaj korpoj certe estus pli bonaj kiel alianculoj ol kiel malamikoj. Kaj Larkin kaj Brown, fondante bovobienon, dependos de aborigenaj laboristoj eĉ pli ol la ŝafbienistoj, ĉar bovoj ne estas ŝafoj!

Nek Larkin nek Brown estis fakte la posedanto de la bieno. Ili estis administristoj: la laŭleĝaj posedantoj estis investistoj en Melburno. Tiuj posedantoj emfazis, ke “oni ne dorlotu la sovaĝulojn, kiel ajn timigaj ili aspektu”.

“Ŝajnas al mi, ke ni devas provi atingi interkonsenton kun tiuj nigruloj,” diris Larkin. “Ni parolu kun ilia reĝo. Sed ni tenu pafpretaj niajn *Winchester*-fusilojn.”

Sed antaŭ ol Larkin and Brown povis kontakti la Banubi, grava incidento okazis ĉe alia bieno. La domo troviĝis sur Ungabadi-teritorio, sed laŭ la paperoj oficiale transdonitaj al la posedanto, s-ro Potter, la bieno etendiĝis sur Banubi-teron ĝis rivereto, kiu estis aparte sankta al la tribanoj. Iun tagon Potter kaj liaj hundoj pelis ŝafojn al tiu rivereto, fakte en ĝin.

Baldaŭ Elmaru kaj aliaj batalemaj viroj eksciis, ke la sankta akvo estis profanita de tiuj stultaj harkovritaj bestoj. Dudeko da grandkreskaj viroj kun ŝvelaj muskoloj subite aperis kaj tiel timigis Potter per siaj minacoj kaj batalkrioj, ke la blankulo simple fuĝis. Li eĉ malpurigis sian pantalonon, despere sprintante al sia ĉevalo.

Potter preskaŭ mortigis sian ĉevalon, galopigante ĝin dekojn da mejloj. Fine li atingis Derby kaj provis vendi sian bienon kaj ĝiajn ŝafojn. Sed

eventualaj aĉetontoj informiĝis pri la incidento kaj ne kuraĝis pli ol Potter. Tiu bieno baldaŭ ĉesis ekzisti. La Banubi forprenis ĉion valoran por si – aparte ili ŝatis vitron, per kiu ili faris pintojn por siaj lancoj. Kaj la ŝafojn ili buĉis laŭplaĉe.

Sed la ceteraj blankaj bienistoj kaj la loĝantoj de Derby ne povis akcepti tiun rezulton. Se kelkaj nigruloj sukcesos forĉasi unu bieniston, eble aliaj nigruloj imitos tion kaj fine forĉasos ĉiujn blankulojn; ili ja nombris multe pli ol la eŭropanoj. Laŭtaj postuloj iris de Derby al Perto: devos esti punekspedicio por venĝi kompatindan Potter. Sed provizore la Banubi ne sciis pri tiuj postuloj.

Tiam okazis katastrofo por la Ungabadi. La malsano, neniam konata antaŭ la alveno de blankuloj, disvastiĝis inter ili kaj mortigis grandan plimulton. La kelkaj postvivintoj kredis, ke la malsano venas el la biendomo mem, kaj ili fuĝis al parencoj pli okcidente. Nur unu lama maljunulo, Karukaru, restis ĉe Ulgangulura.

Tiu Potter-incidento eble signifis, ke ankaŭ Larkin kaj Brown ne sukcesos pace intertrakti kun la Banubi. Sed ili devis provi: la malapero de la Ungabadi signifis, ke nepre aliaj nigruloj devos veni fari la laboron. Larkin kaj Brown rigardis Elmaru kaj alian giganton nomatan Pukera kiel “reĝojn” kaj sendis mesaĝon, ke ili pretas paroli. Parolado eblis, ĉar Karukaru, kies lingvo estis parenca al tiu de la Banubi, interpretis.

Elmaru kaj Pukera aperis ĉe Ulgangulura la tagon fiksitan de Larkin. Elmaru montris ĉi-foje alian econ de sia karaktero: malgraŭ sia granda staturo kaj timoveka mieno, li povis ankaŭ bone aktori, eĉ ĉarmi, eĉ kiam en sia koro li havis agresan intencon. Li sukcesis ŝajnigi, ke li parolas por ĉiuj Banubi – kaj en tiu momento Pukera ne kontraŭis. Vidu, diris Elmaru, ni deziras pacon kun la palvizaĝuloj, kondiĉe ke ili respektu niajn kutimojn kaj nian teritorion. Ni ne atakos vin, s-rojn Larkin kaj Brown kaj viajn dungitojn, se vi ne surpaŝos nian teron. La limo estas ĉe la gorĝo Bandjina. Kaj aparte ni ne permesos, ke viaj bestoj malpurigu la akvon de

la gorĝo; vi rajtas uzi la akvon de la rivero malsupre de la gorĝo – ĉiukaze tio estas Ungabadi-tero. Se vi volas, ke Banubi-viroj laboru ĉe vi, tio eblas: sed vi devas bone manĝigi ilin kaj permesi, ke ili foriru, kiam ceremoniaj devoj vokos.

Elmaru parolis tiel milde, kun oftaj ridetoj, kvazaŭ li ĝuus babiladon kun malnovaj amikoj, ke la blankuloj sentis, ke ili povas fidi lin. Larkin demandis, kiom da Banubi-homoj volas labori ĉe la bieno. Elmaru afable ridetis kaj respondis, ke li devos unue demandi ilin. Li eĉ promesis tion fari “baldaŭ”. Per tio la interkonsiliĝo finiĝis.

Kiam la du altkreskaj viroj estis jam for, Larkin diris al Brown: “Bona komenco. Se li estas amika, li certe pozitive influos la ceterajn. La serĝento en Derby asertis, ke tiu Elmaru estas la plej danĝera el ĉiuj nigruloj. Se tio pravas, ni ĝoju. Lia mieno tute ne spegulas tian reputacion.”

“Dio mia,” respondis Brown, “kiaj belaj specimenoj de viro! Kiom da angloj estas tiel grandaj kaj atletaj?”

“Sendube vivo de ĉasisto estas saniga. Sed mi konsentas, tiuj nigruloj en la montoj ege imponas per sia statur.”

Ĉu Elmaru sincere intencis helpi la bienistojn, neniu povas nun diri. Eble li planis iel tenti la blankulojn, ke ili donu pli malavarajn laborkondiĉojn. Eble li tute ne intencis peri laboristojn. Ĉiukaze tia kunlaboro inter Elmaru kaj la bienistoj estis vanigita preskaŭ tuj.

Du tagojn post la interparolo ĉe Ulgangulura kelkaj Banubi-virinoj, kiuj hazarde estis ĉe la rando de la klifoj donantaj grandiozan panoraman vidon al la subaj ebenaĵoj, kuris anonci, ke bando da ĉevalrajdantoj alproksimiĝas. Elmaru estis tuj informita, kaj arigis refoje grupon da batalantoj, ĉiuj kun almenaŭ tri lancoj. La situacio ŝajnis al li postuli tian sindefendon. Kelkaj Maljunuloj rifuzis kuniri: Elmaru estis ilia malamiko.

La grupo da rajdantoj estis polica trupo el Derby. Serĝento Lindsay, du

aliaj blankhaŭtaj policistoj, kaj kvar nigraj spuristoj. Ĉiu membro de la grupo havis fusilon, eĉ la aborigenoj. Ĉar tiuj nigraj helpopolicistoj devenis el la sudo de la kolonio, ili rigardis la blankulojn alianculoj en la stranga mondo de fremdaj triboj. Do ankaŭ ili ricevis fusilon.

Lindsay jam delonge volis ion entrepreni kontraŭ Elmaru kaj la Banubi, ĉar ilia sukceso forĉasi Potter povus esti fatala fanfaro, se oni ne “donos lecionon al la nigoj”. Lindsay sciis, ke la tuta loĝantaro de Derby – kun kelkaj hontindaj esceptoj – kaj la bienistoj en la tuta regiono Kimberley aprobas punekspedicion, kaj oni certe regalos lin per bieroj post sukcesa ekspedicio.

Elmaru kaj liaj kunuloj kiel eble plej rapide desupris tra rokkavernoj kaj lokis sin ĉe la enirejo de la gorĝo Bandjina. Ili formis solidan vicon da lancportaj defendantoj, kaj rezolutis ne lasi la blankulojn pasi. La gorĝo estis ilia dum jarmiloj, kaj ili certe ne intencis cedi eĉ unu paŝon al la fremduloj. Virinoj kaŝis sin en apudaj kavernoj kaj kriis kuraĝige al siaj viroj. Ĉiuj sciis, ke la spiritaj Antaŭuloj estus tre koleraĵ, se tiuj sensciaj eksteruloj penetrus en la gorĝon. La pentraĵoj sur la muroj de multaj kavernoj estis sanktaj kaj defendendaj.

Jam delonge la policistoj vidis la Banubi kaj rajdis rekte ilin alfronti. La Banubi estis kutime pli altkreskaj ol ĉiuj iliaj malamikoj, sed ili vidis, ke la homoj alproksimiĝantaj sur ĉevaloj kreskas kaj kreskas, ĝis fine ili sidis multe pli alte ol eĉ Ĝangarilu, la plej alta Banubi. Nigraj manoj nerveze skuetis lancojn, sed Elmaru abrupte ordonis, ke ili atendu, ĝis li ordonos ĵeti.

Serĝento Lindsay tuj konis Elmaru laŭ priskriboj kaj direktis sian ĉevalon al la viro meze de la vico. Li haltis eble tridek paŝojn antaŭ la nigruloj kaj haltigis per mansignalo siajn virojn. Li ordonis, ke ili levu la fusilon kaj celu al la nigruloj, sed ankoraŭ ne pafu.

Elmaru ordonis al siaj viroj stari ĵetopretaj.

Lindsay kriis, “Elmaru Banubi!” Li puŝis la tubon de sia fusilo *Winchester* en la direkton de Elmaru.

Elmaru fingromontris al si kaj diris, “Elmaru.”

Lindsay gestis, ke Elmaru venu kaj – li montris katenojn – submetu sin al aresto.

Elmaru rikanis al la naivulo kaj subite donis la ordonon ĵeti. Samtempe Lindsay kriis, “Pafu!”

La aero estis plena je mortigaj flugaĵoj, sed la ŝtalaj kugloj el la fusiloj multe pli efikis ol la lignaj lancoj.

Unu polica ĉevalo kolapsis kun lanco en la cerbo. Unu el la nigraj helpopolicistoj estis vundita en la dekstra brako. La kaskedo de unu policisto estis fortirita de lanco kaj sango ŝprucetis el malgrava vundo sur lia frunto. Lanco restis svingetiĝante en la selo de Lindsay. Jen la rikolto de la Banubi atako.

Kvar Banubi-viroj falis tuj mortigitaj, tri estis grave vunditaj. La ceteraj tuj ekkomprenis, ke estas vane rezisti per lancoj tiujn diablajn nevideblajn mortigilojn. Ili ekkuris al kavernoj rande de la gorĝo. Inter ili estis Elmaru, kies kurado estis malpli rapida ol kutime: fakte ankaŭ li estis vundita en unu femuro kaj dumkure disŝprucigis sangon. La kriegoj de la vunditoj plenigis la gorĝon Bandjina.

Koleraj virinoj kaj knaboj, ĝis tiam kaŝitaj en kavernoj preskaŭ vertikale super la batalo, provis priĵeti per ŝtonoj la homojn kun fusiloj. Lindsay kolere indikis, ke oni pafu en tiun direkton. Tuj jelpis knabo, trafite de kuglo. Li provis sin teni al rok-elstaraĵo, sed liaj fingroj ne kapablis apogi lian pezon. Li falis eble tridek metrojn, dume kriegante, ĝis lia kapo dispeciĝis sur la rokoj ĉe la bazo de la klifo. Ŝrikoj de virinoj ekaŭdiĝis, sed la ŝrikoj mallaŭtiĝis, kiam la virinoj ree eniris la kavernojn.

La Banubi, kiuj kapablis, fuĝis en kavernojn kaj sin savis. Se ili ne estis tiel grave vunditaj, ke ili mortos en la longaj tuneloj, ili emerĝos horojn poste ie supre en sekureco.

Dume la policistoj kol-katenis la nigrajn vunditojn. Unu viro kun kapvundo ŝanceliĝis kaj falis. Lindsay juĝis, ke la viro baldaŭ mortos, do li alproksimiĝis kaj pafis inter liajn okulojn.

“Vidu,” Lindsay diris al sia ĉefa subulo, “mi sentas tenton simple mortpafi la tutan gregon ĉi tie. Sed estos utile eksponi ilin en Derby kaj pruvi al tiuj

jelpantaj bienistoj, ke la policistoj ja faras ion por ilin protekti.”

Elmaru pasigis kelkajn tagojn suferante kaj kolerante. Estis ja humilige tiel malvenki en batalo, sed ankaŭ li akceptis, ke necesas trovi novan taktikon kontraŭ tiuj damnaj fajrobastonoj de la invadantoj. Sed li koleris ankaŭ kontraŭ si mem: kial li ne uzis la metodon, kiun li iam montris al Jangabara, por kuraci tiun femuran vundon? Li konfesis al si, ke li panikiĝis kaj simple forkuris kaj rezignis pri ĉio, kio iam faris el li timindan batalanton.

Lia malamo al la invadantoj kreskis kaj brulis. Des pli pro tio, ke lia taktiko rezisti la blankulojn ĉe la gorĝo Bandjina estis kondamnita de la Maljunuloj. Ili decidis, ke ili uzos aliajn taktikojn, ke ili provos kompromisi kaj trovi manieron kunvivi kun la damnaj fremduloj.

Do Elmaru suferis duoblan malvenkon. Sed li tute ne rezignis. Li devis malfermi la okulojn de la Banubi – kaj jes, de aliaj nigraj homoj – kaj persvadi ilin rezisti la fetorajn fekulojn. Se necese per ridetoj. Kaj per lancoj ĵetitaj el embusko.

Sed li bezonos alianculojn. La plej kuraĝaj Bunabi-viroj jam falis aŭ estis fortrenitaj en kolkatenoj.

Se nur la nova generacio rapide kreskus kaj helpus lin rezisti la influon de tiuj Maljunuloj (“Maljunulinoj”, li emis diri). Ekzemple Jangabara: tiu kreskanta junulo estus sentima kaj ege lerta batalanto.

Baldaŭ poste dekoj da viroj kaj virinoj el la tribo Banubi laboris ĉe la bovo- kaj ŝaf-bieno Ulgangulura. Sen ilia helpo la plenskala laboro estus simple nefarebla. Kaj krome Larkin kaj Brown nenion pagis al la nigraj laborantoj. La etkostaj manĝaĵoj estis suplementataj de “boŝaj nutraĵoj” kolektataj de la virinoj. La investistoj en Melburno ĝojis pri la bela profito.

La maljunaj homoj de la tribo preferis la surlokan vivon ĉe la bieno. Aparte tiuj, kiuj nur malfacile marŝis: ili certe vivus malpli longe, se ili ankoraŭ vivus kiel nomadoj.

Post nelonge kelkaj beboj aperis, kies patroj estis videble eŭropanoj. Tiuj beboj estis bonvenaj nek en la aborigena mondo (kie oni nomis ilin "flavuloj") nek en la blankula (kie ilia ekzisto estis ignorata). Se tiuj infanoj vivis, do nur pro la tigrina rezolutesco de la patrinoj. Sed ofte oni mortigis la bebojn malgraŭ protestŝrikoj de la patrinoj.

Elmaru dum longa tempo ne montris sin ĉe la bieno. Sed oni suspektis, ke multaj el la bovoj, kiuj estis buĉitaj aŭ forpelitaj de la bieno, estis viktimoj de Elmaru kaj liaj restantaj kunuloj.

Billy kaj Roger daŭrigis sian penoplenan vojon. Ne estis problemo sekvi la padon orienten. Tre ofte videblis iu forlasita objekto, aŭ skeleto de ĉevalo, aŭ kruco. Pro la bruliga varmo la homoj foje simple forĵetis siajn varmajn vestojn. Iuj pendigis ilin ĉe arbeto, kio ial tiklis la ridemon de Roger.

Ambaŭ viroj odoraĉis. Iliaj vestoj estis ŝvittrempitaj, kaj Billy imitis la aliajn, kiuj jam forlasis vestojn. Li ĵetis sian plej varman jakon sur arbotrunkon. Roger tamen ne forprenis sian veŝton.

“Vidu, oldulo, tiu fajna korpokovraĵo estas la lasta spuro de mia iam videbla bonstato. Mi portos ĝin ĝisfine.”

“Afero de la gusto,” diris Billy sarkasme. “Ĝi certe ne pensigas min pri riĉula vestaro, tiu malpurega ŝvitĉifono!”

“Konsentite. Sed kiam ni estos or-milionuloj, mi aĉetos cilindran ĉapelon kaj frakon kaj dancos inter la plej belaj pavinoj de Sidnejo, mia karulo.”

Fine ili ekvidis fumon. “Ĉu aborigena artverko, aŭ izolita bastiono de civilizacio?” demandis Roger.

“Estas bintereno ĉi tie. La bienistoj ne permesas al nigruloj fari fajron.” Billy sin demandis, kial li subite parolas kun la aplombo de homo bone informita.

“Nu, sendube vi pravas, oldulo. Kaj kie estas bieno, estas akvo. Imagu ... lavi nin ... lavi mian karan veŝton ... normale manĝi ...”

Du horojn poste la du lacaj viroj sin trenis al la biendomo nestanta sub alta rokmontaro. Estis la posttagmeza paŭzoperiodo, kaj ie kaj tie ili vidis grupojn da aliaj or-trovemuloj kuŝantaj sub arboj. Evidente oni faris multe da laboro en tiu loko. La ŝtonmura domo atestis pri semajnoj aŭ monatoj da ŝvitiga laboro. Estis multaj solidaj bariloj, kiuj markis kortojn, kie oni enŝlosis bestojn. La du vizitantoj divenis, ke tie oni aŭ brulstampas bovojn aŭ, se temis pri sovaĝaj ĉevaloj, kutimigas ilin al selo kaj brido. Iom for de la kortoj troviĝis arboŝelaj kabanetoj, kaj de tempo al tempo oni vidis tie nigran homformon.

Billy kaj Roger sin prezentis – strange, ili uzis nur la voknomon – al la bienaj manaĝeroj, s-roj Larkin kaj Brown, kaj demandis, ĉu ili povas aĉeti manĝaĵojn. La respondo estis, ke jes: salumita bovaĵo kaj faruno estis haveblaj. La prezoj estis trioble pli altaj ol tiuj en Derby, sed nu, “almozuloj ne povas esti tre elektemaj”, citis Roger. Kaj s-roj Larkin kaj Brown klarigis, ke ne ili mem fiksas la prezojn: ilia tasko estis ekspluati la or-febron kaj sendi multe da mono al la investistoj en Melburno. “Kaj tiuj investistoj ne estas filantropoj.”

La belo de tiu loko ravis Billy. Se li povintus forgesi pri la damnaj muŝoj, li imagintus sin en fabela pejzaĝo. Roger diris, “Neuschwanstein, mia kara!” Jes, la fantaziaĵoj de la freneza bavara reĝo, kiujn oni ofte vidis sur pentraĵoj, parencis al tiu ĉi regiono de ĉielgrimpaj klifoj kaj – ĉu estis lago?

Ambaŭ sentis nerezisteblan altiron al la kanjono, kies akvoj reĵetis la brilon de la suno. Ili paŝoj plilongiĝis kaj plirapidiĝis, kaj baldaŭ ili staris rande de “Edeno!”, kiel Roger deklaris.

Ĝoje la du viroj forĵetis siajn vestojn kaj lasis sin fali en la delice friskan akvon. Ili ludis, ili plonĝis, ili rigardis fiŝojn, ili algapis la sennombrajn kavernojn, ili lasis siajn lacajn korpojn plezuriĝi en la kareso de la rivero. Longe, longe ili naĝis, floris, provis esplori la fundon, kuŝis surdorse en la malprofundaĵoj kaj rigardis la bluan de la ĉielo preter la klifosuproj.

Tiam estis la vico de iliaj vestoj. Ili ne havis sapon, sed ili uzis la subtilajn sablerojn anstataŭe, kaj lavis ĉiun unuopan veston. Poste ili kuŝigis la vestojn sur varmaj rokoj, kaj mem kuŝis nudaj sur sabloduneto kaj emis gliti en ege plezuran dormon. Kun intereso ili gapis al la svarmantaj kakatuoj flugantaj laŭ la gorĝo kaj eligantaj sian akran krion.

“Vere,” Roger ŝajnis revanta, “mi ne memoras pli belan lokon en Anglio.”

“Same,” diris Billy. “Penvaloris tiu terura marŝo.”

Subite Roger rigardis en la okulojn de sia kunulo. Li hezite diris, “Oldulo, vi iam diris tre klare, ke viaj emoj, nu, estas nur unudirektaj ... Ĉu intertempe io ŝanĝiĝis tiurilate?”

“Ne, Roger.” Billy parolis tute sen la iama akreco. Ne, li ne volis seksumi

kun Roger, sed ne plu temis pri io morala. Kiam oni estas ekster la konvenciaj sociaj kadroj, ie en sovaĝejo, li pensis, malnovaj pensŝablonoj malaperas. Ne, li simple ne sentis altiron al tiu maldika, rufhare kovrita korpo. “Sed sciu, oldulo,” li amike imitis la intonacion de Roger, “ke mi tre ŝatas vin alirilate.”

“Komprenite.”

“Se iam ni estos milionuloj, eble ni aĉetu tiun ĉi bienon. Kiel ili nomas ĝin?”

“Aĥ, nun mi devas streĉi mian memorpovon,” diris Roger. “Larkin diris la nomon du fojojn. Nu ... la fino estas LURA ... la komenco estas UL ... kaj poste GING, ne, GANG ... jes, la vorto estas Ulgangulura.”

“Ulgangulura. Vi havas fortan aŭdmemoron, oldulo. Ulgangulura. Hm, ne malbone. Eble tio signifas ‘Ĉielo’ en la loka lingvo.”

Kelkajn horojn ili permesis al si resti en Edeno. La freneza ĉaso post oro ŝajnis provizore aparteni al alia vivo. Sed fine ili sin vestis kaj surdorsigis siajn ŝarĝojn.

Dum ili foriris de la rivero, aŭdiĝis bruetoj. Billy sin turnis kaj ekvidis multajn nigrajn figurojn ĉe kaverno-enirejoj.

“Roger, la tutan tempon oni observis nin.”

Roger aspektis maltrankvila. “Tio signifas, ke ili povis ankaŭ lancumi nin. Ni estis bonŝancaj.”

Ili permesis al si pasigi la nokton ĉe Ulgangulura. Iam dum la vespero Roger subite metis sian kapon ekster la moskito-reton kaj diris, “Tiu ĉi loko vere estas benata, oldulo. Eĉ la moskitoj lasas nin en paco.”

Kaj vere tiel estis. Ili estis aranĝintaj la retojn senpense, aŭtomate. Kaj tiun vesperon senbezone.

“Ha, vera Paradizo!” Billy entuziasmis. “Ni revenu iam ĉi tien.”

Ili tamen volis iri antaŭen, kaj kun renovigita energio. Ili ekiris la postan matenon, sciante, ke la restanta etendaĵo estas pli longa ol la jam primarŝita.

La tagoj pasis preskaŭ rutine, se tiri ĉaron kaj vidi krucojn, mortintajn ĉevalojn, forĵetitajn posedaĵojn, kaj revenantajn homruinojn povas esti rutino. Sed en unu loko ili vidis ion vere nekutiman.

Jam de longa distanco ili vidis viron, kiu evidente moviĝis pene kaj malrapide. Ili ne bezonis multe da tempo por marŝatingi lin. Tiam ili konstatis je sia granda surprizo, ke la viro estas vera giganto, probable la plej alta kaj larĝa, kiun ili iam ajn vidis. Kaj li malrapide puŝis specon de ĉaro kun unu tre alta rado meze. La ĉaro havas dimensiojn konvenajn por tiastatura homo; evidente oni konstruis ĝin speciale por li. Sed kio surprizis, estis la ŝarĝo. Sur la ĉarsurfaco estis ne nur tipaj aferoj, kiujn orfosisto kunportus, sed videble la materialo de du viroj – kaj kuŝanta, sendube malsana viro.

Ĉiuj tri haltis. La giganto volis kelkmomente paŭzi en tiu pezega laboro, kaj la du angloj volis kontentigi sian scivolon. Ili eksciis, ke la viro havas rusan nomon, kiun ili tuj forgesis, ĉar li mem petis ilin nomi lin simple “rusa Joĉjo”.

“Kaj kiu li estas?” Billy kapindikis al la viro kuŝanta sur la ĉaro.

“Mija kamarad’. Malsana. Tre malsana.”

“Kial ne reiri al Derby? Kion vi povos fari por li en Hall’s Creek?”

“Kamarad’ djiri, vŭoli iri Hall’s Crick. Tie trovi oro, saniĝi.”

“Ĉu ni ne povas iel helpi vin?” proponis Roger.

“Nje. Joĉjo fŭorta viro. Fari sola.”

Kvazaŭ por pruvi tion, “rusa Joĉjo” klinis sian vastan dorson, levis la ĉaron per la ege longaj stangoj, kaj ekpuŝis.

“Do bonŝancon!” Billy diris.

La du angloj estis baldaŭ centojn da metroj antaŭ la penanta giganto.
“Tiu malsanulo vere trovis bonan kamaradon,” komentis Billy.

“Jes, mia kara. Ankaŭ mi, se mi rajtas min esprimi tiel emocie. Kiam oni kune tiras ĉaron tra sovaĝejo, egalpaŝe kun la kamarado, oni sentas ian ligan, ĉu ne?”

Billy ĝojis pri tiu agnosko. Jes, kamaradeco kun Roger estis ĝis nun la apogeo de liaj spertoj dum tiu ĉi lacegiga marŝo.

Tagoj pasis. Ili haltis ĉe dua bieno kaj aĉetis pli da provianto. La dua bieno estis apud rivereto, sed al ĝi tute mankis la belo de Ulgangulura.

La rutino ne multe variis, krom ke la nombro da revenantoj pliiĝis. Ĝenerale tiuj homoj asertis, ke ili nenion trovis en Hall's Creek, sed preskaŭ ĉiuj suspektis, ke la aliaj ja trovis oron sed sekretigas tion. Multaj videbligis la trobrilan okullumon de malariuloj.

Alia afero iom maltrankviligis Billy kaj Roger. Pliiĝis ankaŭ la raportoj pri "malbonaj nigoj", kiuj minacas forĉasi la fosantojn el Hall's Creek. Estis raportoj pri jamaj atakoj, ĉiam el embusko. La nigruloj asertis, ke la tero apartenas al ili, kaj estis klare, ke oni devas "instrui" al tiuj impertinentuloj.

"Ŝajnas, ke niaj malhelhaŭtaj homfratoj lernis la lecionon: niaj fusiloj estis pli danĝeraj ol iliaj lancoj. Do ili atakas sekrete, sen deklari militon. Sagace, ĉu ne, oldulo?"

"Perfiduloj!"

"Nu, diru al mi, oldulo, kion vi farus en ilia loko? Proponi duelon: ni kun lancoj kontraŭ vi kun *Winchester*-fusiloj?"

Billy silentis. Refoje Roger pravis. Kiom da blankuloj iam ajn vidis la aferon el la vidpunkto de sovaĝuloj? La karaktero de Roger vere estis multdimensia.

Finfine ili stumblis en senespere konfuzan ĥaoson de tendoj kaj alispecaj dometoj, fatrasoj ĉie, fosaĵoj, krude atakita tero en malbelaj stakoj. Kaj viroj, centoj da viroj diligente fosante, kribrante, serĉante. Centre de ĉio estis pli granda kaj komforta tendo kun ŝildo: *James Hockery or-komercisto*. Apud la enirejo de tiu tendo staris du fortaj viroj kun pistoloj en ujoj ĉe la talizono. La vizaĝoj de la du pensigis, ke ili volonte uzus la pistolojn. En la tendo estis tablo, kaj sur ĝi pesilo. Baldaŭ Billy kaj Roger ekscios, ke la prezoj pagataj de s-ro James Hockery estas nur ono de tiuj riceveblaj en Derby aŭ Wyndham. Tiuj viroj, kiuj sukcesis porti sian oron ĝis Perto, ricevos ankoraŭ pli altajn sumojn. Sed ĉar multaj fosantoj urĝe bezonis monon, s-ro Hockery sendube bone enspezis.

En multaj lokoj oni vidis la ĉarojn, kiuj ŝajnis universala transportilo en tiu mondo.

Kelkaj tendoj estis okupitaj de komercistoj, kiuj vendis manĝaĵojn kaj sortimenton da aliaj artikloj. Ĉirkaŭite de tendoj troviĝis iom granda kaj polva korto, kiu enŝlosis maldikajn ĉevalojn, kiuj provis sin vivteni per la ŝparkreskaj herboj. Ĉevalfekaĵo kuŝis ĉie en la korto.

“Kial la ĉevaloj estas en la mezo?” Billy demandis.

Roger iom cerbumis, kaj diris, “Nu, oldulo, mi supozas, ke se ili estus ekstere, ili estus facilaj ĵetceloj por niaj koleraj indiĝenaj fratoj.”

“Aĉ!” Billy kriis, sulkigante la nazon. Evidente la viroj tie ne aparte zorgis, kien ili pisas.

En tiu konfuzo de renversita tero almenaŭ la rivereto estis agrabla vidaĵo.

Jen la magia loko de ĉies revoj, Hall’s Creek.

Pliaj ĉapitroj mankas en tiu ĉi provversio de la libro. La plenan version de la romano vi povas akiri de www.retbutiko.be

Epilogo: kaj nun?

Ju pli pastro Wegener parolis kun la du homoj aliflanke de la tablo, des pli li ilin ŝatis. Komence de la vespero li estis “pastro Wegener”, lia gastiganto estis “s-ro Waverton” kaj la edzino estis “s-ino Waverton”. Sed iam dum la desertmanĝado li iĝis “Alois”, la dommastro iĝis “Charles” kaj lia edzino “Coralie”. Estis vera plezuro rigardi la evidentan fluon de amradioj inter la iomete musaspekta Charles kaj la eĉ pli musosimila Coralie.

La temoj de la ĝua babilado estis komparo de la angla kuirarto (pri kio Coralie havis multajn spertojn) kaj la bavara, kiu iam interesis la manĝeman pastron; vojaĝoj; la spertoj de Alois inter indiĝenoj de Afriko kaj Aŭstralio, kun emfazo pri lingvaj fenomenoj; la klimato de diversaj mondopartoj; la bela situo de Perto kaj ĝia grandioza Cigna Rivero; belaĵoj de la bavaraj pejzaĝoj kaj la sudorient-anglaj; kaj iom da familia historio de la triopo.

Sed ĉiuj sciis, ke tiaj temoj nur provizore ŝtopas la breĉon. Estis aliaj, multe pli sombraj aferoj, kiuj ligis la tri en komuna simpatio, kiuj fakte estis la bazo de ilia konatiĝo.

Kiam la postmanĝa teo estis trinkata, Alois fine levis la temon. “Ĉu vi scias, ke mi estis en tiu Di-forlasita vilaĝo Derby tuj post la masakro?”

Charles kaj Coralie diris nenion, sed rigardis lin kun granda intereso.

“Estis obscena festo. La kapon de Jangabara oni metis en ian vitran keston kaj ĉiuj iris ĝin algapi. Kaj poste oni celebris la grandan venkon per universala ebriiĝo.”

Hezite Charles demandis, “Ĉu vi mem vidis la kapon?”

“Jes, mi iris pardonpeti ĉe li. Strange, la homoj, kiuj iris moki, silentiĝis. Eĉ la mortinta kapo havis ian dignon. Neniu povis ĝin priridi.”

“Ĉu nur la kapon oni portis al Derby?”

“Jes. La ceteran kadavron Whittacker lasis al la Banubi-virinoj. Onidire ili volvis lin en arboŝelon kaj metis en sekretan kavernon por ĉiam.”

“Mi legis pri lia morto,” diris Coralie. “Li falis kiel aglo, tiel ŝajnas al mi.”

“Pli bone tiel morti ol esti pendumita antaŭ malamikoj en Derby,” aldonis Charles. “Cetere, ĉu vi legis la raporton de la komisionestro de la polico en la parlamento?”

“Ne. Ĉu vi?”

Charles ekstaris kaj iris en sian modestan laborĉambron. Li revenis kaj proponis transdoni ĵurnalon al Alois.

“Bonvolu laŭtlegi al mi. Miaj okuloj doloras kaj aktuale mi evitas legi.”

“Bone. Jen liaj vortoj – kaj se vi volas interrompi por komenti, faru tion.”

Charles surmetis siajn okulvitrojn kaj eklegis:

“Dum longa periodo la setlintoj de la regionoj de Derby kaj Wyndham suferis nervecon kaj angoron pro la rabekspedicioj kaj violento kaj ĝenerala kontraŭleĝa agado de tribo de krimulaj indiĝenoj, kiuj estis sub la gvidado de duoncivilizita aborigeno nomata Anaseto, iama polic-spuristo.”

La pezaj vizaĝtraĵoj de Alois alprenis aspekton de trema kritikemo, sed li dume silentis.

“La problemoj komenciĝis per la murdo de konstablo William Dixon, konfidenculo de la supre nomita Anaseto. Sekvis tion murdo de la vakeroj Jack Mountford, Marcus Strider, kaj Henry Piker. Poste estis murditaj Franz Gräber, orserĉisto, konstablo Graham, konstablo Morrison, konstablo Reynolds, konstablo Lawrence, konstablo O’Hara –“

Alois ne povis plu teni sian langon. “Aĥ, kia falsa prezento! La ‘problemoj’ komenciĝis, kiam eŭropanoj ekokupaciis la teron de la nigruloj! Kaj ĉiukaze Jangabara komencis nenion – la Banubi sub Elmaru jam de jaroj rezistis! Kaj ne temis pri ‘krimulaj indiĝenoj’, temis pri soldatoj defendantaj sian teron – estis milito, ne polica agado kontraŭ krimuloj!”

Charles atendis, ke Alois aŭ daŭrigu aŭ indiku, ke li legu pluen. Alois nepre volis ion aldoni. “Kaj nenia mencio pri la centoj da aborigenoj murditaj de policistoj. Aĥ, pardonu mian interrompon ... mi facile emociiĝas pri la temo. Bonvolu legi.”

“La topografio de la regiono plifaciligis al la banditoj ilian agadon. Sennombraj kavernoj, ofte inter si ligitaj, donis antaŭ ĉio al la supre nomita Anaseto la ŝancon murdi, rabi, detruigi la posedaĵojn de bienistoj aŭ policistoj, kaj poste malaperi. La karakteriza pejzaĝo grandparte nuligis la utilon de ĉevaloj, kaj batali kontraŭ ruzaj kaj spertaj indiĝenoj sur ilia propra tereno estas tre peniga tasko.”

“Aha! Fine unu honesta vorto! *Sur ilia propra tereno!* Fine la poliestro konfesas, ke estas – aŭ almenaŭ estis – tero apartenanta al la aborigenoj!”

Charles atendis, ĝis Alois donis signalon, ke li daŭrigu. “*Fronte al tiuj fortostreĉaj kaj pezaj taskoj, nia polico montris tre admirindan persiston. Aparte rekomendinda estas serĝento Colin Whittacker, kiu nelacigeble penis, ĝis venis la ŝanco venki en du apartaj bataloj la banditojn kaj persone mortpafi la supre nomitan Anaseton. Serĝento Whittacker kunordigis la agadon kune kun la preskaŭ same laŭdinda serĝento Frederick Gates, la estro de la polico en Wyndham. Krom forigi la minacon de Anaseto, serĝento Whittacker kaptis dek pluajn krimulojn, kiuj poste ricevis en Derby diversajn verdiktojn, inter ili tri ekzekutojn.*

Plua gajno de tiu meritoplena kampanjo estis, ke fine oni povas utiligi la plej bonajn paŝtejojn de la kolonio. Ni povas nin gratuli kaj konkludi, ke neniam plu estos serioza rezisto al la civiliza procezo en tiu parto de nia kolonio.”

“Jes ... li volas diri, ke la tero, kiu apartenis al la Banubi dum sennombraj generacioj, estas por ĉiam forrabita kaj donita al fremduloj.”

Coralie fine komentis. “Aŭskultu al la lasta parto de tiu oficiala raporto. Ni ĉiuj nun scias neoficiale pri la rolo de Macky. Sed oni ne divenus tion el la vortoj de la komisionestro.”

Charles sciis, ke la du aliaj silente petas lin finlegi. “*En la cirkonstancoj mi petas, ke oni rajtigu min disdoni al ambaŭ serĝentoj premion de 50*

pundoj; krome al serĝento Whittacker, kiu ne plu povas libere uzi sian maldekstran manon, kompensopagon de 100 pundoj; al ĉiuj el la dudek kvar konstabloj premion de 10 pundoj; kaj al ĉiu el la dek du nigraj helpopolicistoj varojn je la valoro de unu pundo. Al la indiĝeno Macky, kiu montriĝis utila en la spurado de la bando de Anaseto, mi volonte donus kromajn varojn je la valoro de 10 ŝilingoj.”

Coralie komentis: “Cent kvindek pundoj al Whittacker, unu kaj duono al Macky. Malgranda premio por tia perfido. Kaj mi vetas, ke Macky ne ricevos medalon, dum la blankaj sinjoroj povos iam montri metalan distingilon al siaj genepoj ...”

Alois estis preskaŭ ploronta. “Diru al mi, miaj geamikoj, kial nia epoko estas tiel fia? Mi scias, ke la *krimoj* en la britaj kolonioj ne estas unikaj – ni germanoj agas simile en Afriko, fakte ĉiuj koloniaj potencoj kulpas pri grandaj krimoj, sed neniu uzas la vorton krimo. Krom se la viktimoj provas sin defendi – tiam *ili* ja krimas!”

Coralie diris, “Alois, ne ploru, vi estas inter sampensuloj ĉi tie. Sed mi komprenas vian turmenton. Kio eble plej pezas sur mia koro, estas la manko de senso por proporcioj. Jangabara mortigas unu policiston, kaj tio estas krimo. Policistoj ekstermas tutan tribon, kaj tio estas *necesa dispelo de nocaj elementoj.*”

“Ho jes, estas io ege fia en nia psiĥo. Vidu, mi ofte aŭdis pri ‘militoj’ inter aborigenoj. La ĝenerala rutino estas, ke du ‘malamikaj triboj’ interkonsentas pri sia ‘milito’ sur konvena ebenaĵo. Ili staras vidalvide, ili mokas kaj insultas la alian flankon, ili ekscitas sin, ĝis iu ekĵetas lancon. Kutime unu lanco estas facile fortunebla per ŝildo, sed se multaj lancoj samtempe flugas, fine iu devas esti vundita, eĉ eventuale mortigita. Sed tuj post sangofluo la alia flanko laŭte proklamas sian venkon, kaj jen la fino de la ‘milito’. Sed kiam ni eŭropanoj militas, ni celas ekstermi kiom eble plej da malamikoj. Kial ni estas tiel fiaj kompare kun la tiel nomataj ‘sovaĝuloj’?”

Charles intervenis, “Alois, kiel sindediĉa kristano vi ne konsentos, mi supozas, sed foje mi atribuas tiun kruelecon al la biblia ordono de Jehovo. Oni mortigu ĉiujn ĝis la lasta, kaj tiel oni montras sian obeemon al la Kreinto de la Universo.”

Coralie diris, “Ĉu Alois konsentas aŭ ne, mi kredas, ke vi troigas, Charles. Nia kulturo venas el diversaj fontoj, ne nur la izraelida. La grekoj, la romianoj, la ĝermanoj ĉiuj batalis sangavide, ne nur la judoj.”

“Ha, aŭskultu, Alois!” Charles provis malpezigi la etoson. “Ne edziĝu al virino, kiu multe legas kaj estas pli inteligenta ol vi!”

Alois agnoskis tiun ŝerceton per rideto. “Mi ne emas defendi la agojn de tiu dio de la Malnova Testamento ... Sed certe estas aliaj elementoj en la tiel nomata mondpercepto de nuntempaj eŭropanoj. Oni uzas la ideojn de Darwin kaj diras: jen, la superaj rasoj devas venki, la malsuperaj devas cedi. Bona teorio, kondiĉe ke oni estu sur la flanko de la aktuale pli potencaj landoj – kiel ni eŭropanoj dum la lastaj jarcentoj. Sed, kiel mi diru ... se la nuna situacio ŝanĝiĝos, se ekzemple post cent jaroj la ĉinoj aŭ hindoj estos pli potencaj ol la eŭropanoj – kompreneble tio ŝajnas ridinda diro nuntempe – ĉu eŭropanoj ankoraŭ apogos tiun koncepton de superaj kaj malsuperaj rasoj?”

Charles levis la manojn, kvazaŭ indikante, ke li alfrontas nesolveblan problemon. “Alois, mi absolute konsentas. Sed kion ni faru? Laŭ la ideoj, kiujn vi kaj ni havas, ni devus rezigni pri tiu ĉi parceleto kaj dometo kaj reiri al la lando de niaj prapatroj.”

Coralie respondis: “Eĉ tio estus problema vidpunkto, Charles. Viaj geavoj kaj miaj estis angloj, sed iam iliaj praprapraavoj venis de alia loko kaj mortigis aŭ forpelis la antaŭajn loĝantojn. Eble *homo sapiens* devus redoni la tutan Eŭropon al *homo Neanderthalensis*. Kaj kiujn la neandertalanoj forpuŝis?”

Alois mallaŭte ridis, “Mi komprenas nun, Charles, kion vi diris pri tro inteligentaj edzinoj! Jes, kara Coralie, kion fari? Mi ne scias. Se mi reirus al Bavario kaj esplorus, mi sendube trovus, ke miaj prapapatroj ekstermis keltojn kaj ŝtelis ilian teron. Ja, kie mi povus senkulpe vivi?”

Ĉar neniu povis ion proponi, Charles levis tute alian temon. “Ĉu vi scias, ke ŝajnas eble, ke baldaŭ ĉiuj kolonioj kuniĝos kaj kreos unu landon sur la kontinento?”

“Jes, tion mi aŭdis. Ĉu tio plibonigos la situacion de la aborigenoj?”

“Eble,” respondis Charles. “Eble mia tre saĝa edzino,” li ridetis amradiante al ŝi, “povas aŭguri ...”

Coralie Waverton karese tuŝis la ŝultron de sia etstatura edzo. “La respondo estas facila: mi ne scias.”

Notoj

[1.](#) 960 kilometroj

[2.](#) 640 kilometroj

[3.](#) Proksimume 30 kilometroj

[4.](#) R.I.P. requiescat in pace (latinaĵoj): Li ripozu en paco.

...

Kolofono

Titolo Flugi kun katatuoĵ

Aŭtoro Trevor Steele

Kovrilo Julia Litvinova

ISBN de la papera eldono 978-90-77066-46-1

UDK 82.3.892

NUR 300

Leĝa depono de la papera eldono D/2010/2924/2

IBAN 100456

Eldonis Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 160 - 2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2010 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono kaj pro tio rajtas esti libera kopiata.